


1987 februaro
80a jaro
n-ro 974 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Interlingvoj
de la mondo

Vi trovos

duonon el niaj paĝoj dediĉita al tiu vasta plimulto en la mondo, por kiu interlingvo estas nek studobjekto nek satokupo, sed ĉiutaga neceso. Verŝajne ĉiuj ni konsentos kun la aŭtoritata analizo de Blanke (recenzita sur p. 34), ke Esperanto estas la sola *planlingvo*; sed *interlingvoj* abundas sur nia terglobo. Eble estas utile foje rigardi iliajn problemojn kaj sukcesojn, por plivastigi nian perspektivon pri la propra lingvo. Kial homoj lernas Esperanton, anstataŭ alian, pli vaste parolatan interlingvon? Kiel Esperanto povas rilati, ene de koncernaj landoj, kun aliaj (eble devigaj) interlingvoj — la svahila, la hindia, la angla, la hana? Vi ne trovos rektajn respondojn al ĉi tiuj demandoj en niaj paĝoj, sed sugestojn, eklumigojn, personajn taksojn. Do legu, ĝuu — kaj pripensu!

Enhavo

- 21 Esperanto kaj la angla: ĉu konkurantoj? (Mark Fettes)
- 22 Noto por uzantoj de la delegita reto
- 23 Praktikismo aŭ idealismo? (James Fallows)
- 24 Hinda Unio (Bharato): Du interlingvoj kaj milo da aliaj (Probal Daŝgupto); Lingvaj problemoj mortigas en Goa
- 26 Semajno de Internacia Amikeco
- 27 Esperanto en Afriko: la Jubilea kaj poste (Hans Bakker)
- 28 Afrikaj lingvo-problemoj (Jan Knappert)
- 30 Eŭropa Komunumo: Armeo da interpretistoj kostas milionojn al EK
- 31 Ĉinio: Putonghuo: interlingvo por la 56 ĉinaj nacioj (Chen Yuan)
- 32 Reagoj: Ĝis la fina malvenko (Ivo Lapenna); Savi skemismon per laŭbezona naturismo (Klaus Schubert); Vivu la simpla Esperanto (Renato Corsetti)
Konkurso de la Pola Radio
- 33 Aŭkcio de antologioj
- 34 Recenzoj: *Internationale Plansprachen: Eine Einführung* de Detlev Blanke (W.A. Verloren van Themaat); *La konflikto de la epokoj*; *Libro 2* de Edwin de Kock (Baldur Ragnarsson); *Pri literatura kritiko* de Fernando de Diego (N.T.R. Salvesen); *Liza kaj Paŭlo* de Reto Rossetti (Audrey Childs-Mee)
- 37 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 38 Kongresa Komunikado de la 72a UK en Varsovio
- 39 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
Nekrologoj
- 40 Anoncetoj

La kovrilo

Jen vidoludo (analoge kun vortludo!) pri tre potenca mita simbolo de la monda lingvo-problemo: la babela turo, kies minacatan atingon de la ĉielo malebligis la Dia puno de lingva ĥaoso. Ĉu tiuj seĝovicoj ne iel trafe atentigas, ke temas ne nur pri mito sed pri aktuala kaj urĝa problemaro? Inter la socia kaj lingva komplikeco spegulta en ĉi tiu numero, la movado bezonas ĝuste tiajn modernajn simbolojn por bildigi la rolon de Esperanto...

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 UEA NL; **Telegram-adreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo varias laŭlande (gld. 44,50; US \$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%.

Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.

Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.: tel. (1) 316-423.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cicina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.

Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Interlingvoj: elirejoj aŭ koridoroj de la babelaj turo?

Estas neeble en deko da paĝoj prezenti pli ol etan ekzemplaron pri la lingvoproblemoj (kaj -solvoj) de la mondo. Oni ofte citas ciferon de ĉ. 3 000 parolataj lingvoj en la malpli ol 200 landoj de la terglobo. Niaj elektoj, do, — Afriko, Hinda Unio, Ĉinio, Eŭropo, la angla kiel internacia lingvo — ne celas esti pli ol supraĵe reprezentaj. Ekzistas multaj fon-

toj de pliaj informoj: plej elstare, la revuo Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado, komuna eldonaĵo de la Presejo Universitato de Teksaso kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-problemo. Artikoloj en LPLP estas diverslingvaj, sed ĉiam kun Esperanta resumo. Jarabonoj kostas US\$18 (individue) aŭ US\$27 (grupe), pere de UEA.

Esperanto kaj la angla: ĉu konkurantoj?

La anglalingva gazeto *The Economist* publikigis en la numero de la 20a de decembro 1986 5-paĝan artikolon, kiu detaligis la nunan disvastiĝon kaj diversmanieran uzon de la angla, en ĝiaj pluraj formoj. Laŭ la aŭtoroj, 330 milionoj da homoj parolas la anglan kiel denaskan lingvon, proksimume la sama nombro uzas ĝin kiel duan lingvon, kaj tria tiugranda grupo kiel fremdan, aŭ kiel oni pli ofte diras, internacian lingvon. La angla estas la lingvo, laŭ la artikolo, de scienco, internacia junulara kul-

en aparta enkadra teksto pri la "konkurantoj" de la angla:


"La plimulto de la fakuloj samopinias, ke Esperanto troviĝas en sakstrato. Kial neanglalingvana studento dediĉus tempon kaj rimedojn por lingvo-lernado al Esperanto anstataŭ la angla? Esperanto estas tiel eŭrocentrisma laŭ sia vortaro kaj strukturo, ke ĝi ne povas pretendi esti multe malpli diskrimina kulture ol la angla. Ĉiukaze, la kulturo propra al la angla estas parto de ĝia allogo: almenaŭ kelkaj komencantoj en la angla antaŭĝuas la trezorojn de Ŝekspiro, Mark Twain kaj Yeats. Kaj tiuj lingvistudentoj, kiuj havas malpli altajn ambiciojn — rafinisman ŝatadon de la liriko de Bob Dylan, sekvi "Dinastio" sen la subtitoloj, akiri la lokan merkataĵon de Macdonald's, elmigri al Usono — havas eĉ malpli da kialoj por detiriĝi de siaj anglalingvaj studoj."

La angla: internacia lingvo, sed kia?

Ni revenos al tiuj komentoj poste. Ili estas gravaj, ĉar ili spegulas ĝuste tiujn (mis)konceptojn pri Esperanto kaj pri internacieco, kiuj estas plej disvastigitaj kaj kiujn ni devas ree kaj ree kontraŭbatali. Oni ne povas pretendi, tamen, ke la citita artikolo estas stulta aŭ aparte tendenca, ĉar troviĝas en ĝi ankaŭ jenaj konstatoj:

"La anglan, koncize dirite, oni facile parolas malbone — kaj tio estas la sola nepra kondiĉo por mondlingvo, se per mondlingvo oni celas koncizigitan kodon, rimedon por transdoni kaj havigi simplajn informojn... Kiel perilo de pli kompleksaj sociaj intertraktoj, la angla tamen estas evidente malpli taŭga por esti vera mondlingvo. Ĉi tie ĝia vasta vortaro ja komencas montriĝi timinda obstaklo."

"Multaj lingvistoj nun malakceptas la nocion de ĉiokovra singulara substantivo 'la angla lingvo', kun ĝia implico de relativa unueco. Ili uzas



Mapo el *The Economist*. La angla kiel:

denaska lingvo piĝino, kreolo
dua lingvo fremda lingvo


turo, diplomatio, komerco, kaj — ekzemple en Sovetunio kaj Ĉinio — la plej vaste studata fremda lingvo en la mondo.

Unuavide povas ŝajni, ke la angla — se oni momente forgesas pri tiuj tricent milionoj de denaskaj parolantoj — nuntempe okupas ĝuste tiun lokon en la mondo, kiun esperantistoj sopiris por sia lingvo dum la pasintaj cent jaroj. Ankaŭ ŝajnis tiel al la aŭtoroj de la artikolo, kiuj prikomentis Esperanton

anstataŭe la malbelan terminon 'la anglaj lingvoj' (anglezoj), kiu per si mem efektive defias la tutan nocion de ideala difinebla 'angla'."

Kaj konklude ili resumas:

"La angla ne anstataŭadas aliajn lingvojn, kiel ti-
mas kontraŭantoj de ĝia disvastiĝo. Plejparte ĝi al-
doniĝas al ili, permesante al fremduloj paroli unu al



la alia. Jen pli milda kaj pli utila rolo — kaj iu, kiun plenumas la angla aprobinde kaj laŭmerite, en ĉiuj ĝiaj variaj variaĵoj."

Tiu koncepto estas efektive plene esperantisma, kvankam ĝi ignoras kelkajn realajn sociajn kaj politikajn problemojn de la angla, tro bone konatajn de esperantistoj por bezoni listigon ĉi tie. Pli interese, ĝi ankaŭ ignoras la suprajn limigajn konstatojn: ke la angla plene taŭgas kiel mondlingvo nur por relative simplaj, malsubtilaj intertraktoj. Mi suspektas, ke la aŭtoroj de la artikolo, kiam ili parolas pri "la angla", fakte pensas pri *sia* angla, en kies uzo ili kompreneble tute ne sentas limojn!

La kontraŭaj allogoj de Esperanto

Sed jen sufiĉe pri la angla — ĉar, kiel montras i.a. la supraj citaĵoj, oni provas kompari du tute malsamajn aferojn. La problemo estas ĝuste, ke oni ofte konceptas Esperanton kiel "koncizigitan kodon", kaj nur ĝiaj parolantoj vere komprenas, kia eleganta kaj egalstatura lingvo ĝi estas. Due, oni miskomprenas (nemirige, ĉar temas pri tre subtila ideo) la nocion de "kulturo". La kulturo propra al Esperanto ligiĝas ne al ĝiaj vortaraj aŭ historiaj fontoj en Eŭropo, sed al la lingva komunumo kiu uzas ĝin: kaj la ekzistkialo de tiu komunumo estas la idealoj de internaciismo kaj kultura egaleco. Tion montras i.a. la forta subteno de Esperanto flanke de la ĉina

registaro, kiu simple ne eblus se Esperanto sentigus "eŭropismon" al siaj ne-eŭropaj parolantoj. (Kompreneble tio ne neas la fakton, ke Esperanto estas pli facile lernebla por eŭropanoj; ĝi nur distingas inter tiu "teknika" flanko de la lingvo, cetere priatentinda, kaj ĝia efektiva kulturo.)

Restas unu kritiko de *The Economist*, efektive la plej forta: nome, ke estas absurde, ke Esperanto aspiru universalecon, kiam la angla estas kaj verŝajne restos multe pli utila en la praktiko. Pli ekvilibrara komento de tiu temo troviĝas en la apuda teksto de James Fallows, usona redaktoro kiu partoprenis la pekinan UK kaj poste verkis brilan ĵurnalisman pritakson de Esperanto en sia gazeto, *The Atlantic Monthly*. Por Fallows, kiel neŭtralulo, la sola afero kiu igas Esperanton inda ja serioza konsidero estas ĝia ebligo de egaleca komunikado, ĝia idealisma flanko. Pripensinda konstato, aparte por tiuj, kiuj malemas agnoski tiun idealon kaj preferas prezenti Esperanton kiel lingvon "utilan" (aŭ ILan)...

Ne estas la devo de ni kiel esperantistoj kontraŭbatali la uzon de la angla kiel internacia lingvo: la angla efektive estas utila, kaj almenaŭ parte respondas al tiu sentata bezono de "koncizigita kodo, facile parolebla malbone". (Se angloj volas lasi sian lingvon je tia traktado, kaj se aliaj pretas akcepti la rezultan ekonomian kaj kulturan avantaĝon de anglalingvaj landoj, tio estas ilia afero! Ambaŭ tendencoj cetere havas siajn naturajn limojn.) Tio, kion ni devas fari, estas sciigi la homojn pri la ekzisto de pli universala mondlingvo, kiu respondas al pli profundaj kaj vastaj postuloj, kaj ebligas komunikadon en la kadro de kulturo ne simple neŭtrala, sed pozitive egalisma kaj tutmondisma. En tiu kadro Esperanto ne konkuras la anglan aŭ iun alian lingvon: ĝi estas senrivala.

Mark Fettes

Noto por uzantoj de la delegita reto

La Centra Oficejo antaŭnelonge ricevis leteron de Liem Tjong Hie, la UEA-delegito en Indonezio, kiu parte tekstas jene:

"Mi ĵus ricevis leterojn de du esperantistoj, kiuj ambaŭ veturos kiel turistoj al Indonezio, unu dum somero. Ili ambaŭ ne plenumas la regulojn de informpetado, t.e. sendo de sufiĉa kvanto da internaciaj respondkuponoj (irk-oj) por tuja persona respondo. Sen tiuj respondkuponoj ne eblas al mi respondi... Plue, kiel sud-aziano en tropika lando mi ne plu memoras kiam estas la tempo de eŭropa somero."

La mesaĝo por uzantoj de la delegita reto (kies reguloj estas klare priskribitaj sur paĝoj 93-94 de *Jarlibro 1986*) ŝajnas atentinda.

Praktikismo aŭ idealismo?

La jena teksto estas ĉerpita el longa, detala artikolo aperinta en The Atlantic Monthly (Novjorko, Usono), numero de decembro 1986. Verkis ĝin la vaŝingtona redaktoro James Fallows, surbaze de siaj spertoj en la pekina UK kaj el nemovadana vidpunkto. Lia sobra takso de la Esperanto-movado estas tre leginda por movadaj aktivuloj; esperantigita versio (aŭ la originalo) haveblas de la Centra Oficejo. Kursivaj vortoj aperis tiaj (en Esperanto) en la originalo.

(...)

Se la tutmonda uzadnivelo de Esperanto proksimas tiun de Pig Latin*, ĉu gravas ke unu estas vera, eĉ eleganta lingvo kaj la alia estas ŝerco? Esperanto daŭris naŭdek naŭ jarojn, pli ol iu alia planlingvo. Sed kiam oni inventis ĝin, la germana estis la lingvo de scienco, la angla tiu de komerco, la franca tiu de diplomatio kaj snobismo. Nun la angla plenumas ĉiujn tiujn rolojn — do, kial iu interesiĝus pri Esperanto?

(...)

La plej frenezsona kialo por studi Esperanton — tiu kiu plej probable elvokus primokadon de tiuj ekster la gregejo — estas ĝia "praktikeco": lerni Esperanton kaj vidi la mondon! Por kelkaj el la kongresantoj la lingvo efektive malfermis pordojn. La bulgaroj, la irananoj kaj multaj el la ĉinoj ne ko-



Ilustraĵo el la artikolo de Fallows. La alia estis kuko kun kandeloj kaj la Esperantaj vortoj "Feliĉan Naskiĝtagon". Tre pozitiva eco de tiaj ilustraĵoj estas, ke ili prezentas Esperanton kiel normalan, ĉiutagan lingvon.

nis iun alian mondlingvon kaj verŝajne havis nenian alian pretekston por ricevi vizon. "Multaj homoj vidas ĝin kiel atingeblan lingvon," diris [Diccon]

* *Pig Latin (Porko-Latino): ŝerca formo de la angla uzata de infanoj por ludi.*

Masterman. "Ili eble kredas, ke ili neniam lernos la anglan, sed Esperanto ebligas ilin ekiri."

Masterman kaj Osmo Buller, sobra, juna finno kiu nun direktas la centran oficejon en Roterdamo, estis plenaj je "praktikaj" ilustraĵoj pri la tuja vasta modiĝo de Esperanto... Sed eĉ ĉe la Kongreso, tia praktika parolado estis escepto. Kiam la esperantistoj volis paroli kun iu neklubano — ĉinaj ŝoforoj aŭ hotelistoj, ekzemple — iliaj elektebloj estis la angla aŭ la ĉina. En post-kongresa ekskurso al suda Ĉinio, angle-parolanta loka ĉiĉerono kiu erarvadis inter la esperantistojn konstatis, ke mia familio dividas ŝian malfeliĉan staton. Ŝi rendevuis kun ni en trinkejo, priparolis la lingvo-trejnajn programojn de Ĉinio, kaj klarigis, ke prudentaj gepatroj mortigus sin, se inteligenta infano elektus studi Esperanton anstataŭ la anglan. La tagon post la fino de la Kongreso, iu ĉifonita orienteŭropano klopodis havigi veturklarigojn de hoteldeĵoranto. Li faris demandon en Esperanto. "Parolu angle!" morde rebatis la deĵoranto, tiel finjuĝante la dusemajnon pasintan.

"Mi fariĝis multe malpli praktikisma ol mi iam estis," Humphrey Tonkin diris al mi. "Antaŭ dek kvin jaroj mi eble emfazus la praktikajn avantaĝojn pri la lernado de Esperanto. Nun neniu povas pretendi, ke Esperanto konkuros kun la angla. Sed mi estas pli idealisma nun. Esperanto ebligas specon de komunikado, kiun la angla malfaciligas."

Du semajnojn pli frue, mi eble priridus ankaŭ tion, sed je la fino de la Kongreso mi kredis, ke mi komprenas kion celis Tonkin. La plimulto de la kongresanoj scipovis la anglan, sed Esperanto permesis al ili komuniki sen tiom zorgi pri la demando, kiu parolas pli bone ol kiu.

En iuj mondopartoj — sudorienta Azio estas eble la plej bona ekzemplo — oni uzas la anglan simple por komuniki, ne por kunporti la kroman ŝarĝon prijuĝan. Ĉinoj, malajoj kaj tamiloj ĉiuj parolas ĝin kiel duan, komercan lingvon kaj perdas malmulte da tempo por zorgi pri prononcado kaj "lerteco". Sed tio estas escepto. Usonanoj kaj britoj povas uzi la anglan tutmonde — sed la alia konversaciano ĉiam parolos "deklivosupren", kiel esprimis tion William Harmon, ŝipkompaniestro el Kalifornio.

(...)

Ĉu tio estas sufiĉa kialo por lerni Esperanton? Por mi, ne. Mi preferus pasigi la tempon plibonigante mian japanan. Sed mi ne plu emas primoki tiujn, kiuj ja faras la penon. Ili ne damaĝas ion, kaj je persona nivelo ili eble eĉ faras bonon. Se interesas vin aliĝi al ili, la adreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko estas P.O. Box 1129, El Cerrito, Kalifornio 94530.

James Fallows

Du interlingvoj kaj milo da aliaj

Oni en Bharato parolas pli ol mil lingvojn kaj skribas ĉ. dudekon da ili, kaj neniuj lingvoj estas komprenata de plimulto de nia popolo. Pro tio, nia situacio estas iom unika. Nia respubliko agnoskas dek kvar lingvojn en sia Konstitucio plus Amendo. Difinitaj ŝtatoj, ene de la respubliko, agnoskas pliajn. Restante eĉ nur ĉe la respublike oficialaj dek kvar lingvoj, se ni volus instrui ĉiun el tiuj al eĉ po kelkaj parolantoj de ĉiu el la aliaj lingvoj, ni bezonus trejni 14 oble 13, nome 182 specojn da lingvo-instruistoj.

La bharata publiko tamen ne postulas, ke nia sistemo tiom streĉu fortojn preter sia kapablo. Parolanto de la kaŝmira kaj parolanto de la asama preskaŭ neniam volas lerni la lingvojn unu de la alia. Se ili hazarde volas, ili sukcesas trovi vojon ekster la oficiala lerneja sistemo, kiu neglektas tiajn bezonojn. Ordinare, bharatanoj lernas la hindian aŭ la anglan aŭ ambaŭ por kontakto kun aliŝtatanoj. Nur loĝantoj apud ŝtatolimoj (kiuj en Bharato de post 1956 koincidas pli-malpli kun la limoj inter la grandaj lingvoj) kaj enmigrintoj en iun ŝtaton kutimas lerni la lingvon de malpropra ŝtato.


En 1981 oni konstatis, pere de popolnombrado, ke pli ol 36 procentoj de la bharatanoj nun kapablas legi. Tiu cifero estas komparenda kun la 29 procentoj de 1971. Malgraŭ la konata popolnombra eksplodo, la proporcio de analfabetoj do konstante reduktiĝas. Ĉiam pli da tavoloj de nia popolo komencas partopreni la laborojn de nia demokratio, enlande kaj eksterlande. En tiu fono, bharatanoj ĝenerale rigardas la anglan lingvon nepre ilo por sukcesa kariero. Tial, multaj malriĉaj kaj mezmalriĉaj homoj en la lasta jardeko pretis oferi preskaŭ senprecedencajn sumojn, por ke iliaj infanoj ricevu elementan kaj mezan edukon, kiu inkluzivas ne nur lernon de la angla, sed eĉ lernon de ĉio alia pere de la angla.

Retemos poste pri la angla. Unue necesas noti, ke ankaŭ la potenco de la hindia kreskas. Kiom da bharatanoj parolas aŭ komprenas ĝin? Estas malfacile diri. Depende de la difino de efektiva rego de la lingvo, oni povas aserti, ke la hindian regas unu kvinono, unu kvarono aŭ eĉ unu triono de la bharatanoj. Sed gravas la kreskanta proporcio de duonkonantoj (precizaj ciferoj mankas) kaj ilia iom post iom pli favora sinteno al la lingvo. Gravas ankaŭ la ofta kaj sistema oficiala uzo de la hindia, i.a. kiel la instruilingvo en la lernejoj kaj iugrade en la universitatoj de la hindie parolantaj ŝtatoj.

Vi eventuale aŭdis pri konflikto inter la angla kaj la hindia por la rolo de nacia ligo-lingvo. Tiuokaze vi certe komprenas, ke ne ĝuste la sama publiko nun emfazas la anglan kaj la hindian. Ekzemple, en difinitaj ŝtatoj, precipe Tamilio sed ankaŭ en aliaj sudaj ŝtatoj kaj Okcidenta Bengalio, la popolo havas kontraŭhindiajn sentojn kaj la ŝtata sistemo apogas tiujn sentojn. Kaj inverse, en la hindie parolantaj ŝtatoj, la popolo kaj la sistemo antaŭenpuŝas plian uzon de la hindia kaj nete malplian de la angla.

Tamen, iugrade la bharata publiko komencas akcepti sistemon de du naciaj ligo-lingvoj por du specoj de celoj. La angla funkcias inter universitato kle-

Foto: Unesko/E.L. Sommerlad



La okulfrapa kontrasto inter plurmiljara kulturo kaj moderna teknologio estas karakteriza trajto de la hodiaŭa Bharato. Lingvaj problemoj certe ludas sian rolon en malhelpo de la evoluado de tiu plej granda el la demokratioj.

raj bharatanoj, precipe ĉe fakaj terminoj. La hindia funkcias ne nur, kiel antaŭe, kun malpli aŭ tute ne kleraj bharatanoj, sed ĉiam pli ankaŭ en la bonstataj medioj kiel malstreĉa, neformala ligo-lingvo. La aliaj ŝtataj lingvoj, kaj la hindia en siaj ŝtatoj, iom post iom formanĝas la ŝtat-nivelan uzon de la angla,

kiun ni heredis de la kolonia reĝimo.

Mi specifu iom la anglalingveman mondumon, pri kiu mi parolas. Oni foje nomas ĝin la eleganta amaso. Ĝi havas multajn vizaĝojn. Temas ekzemple pri la homoj en la Bharataj Institutoj de Tekniko, en iuj privilegiaj universitatoj (sed ne ĉiuj homoj tie), en la plej prestiĝaj militistaj medioj, en la reklama mondo, en gvidaj lokoj en la komercaj kaj industriaj institucioj de la privata kaj publika sektoroj, en la filma mondo, en la diplomata servo. La kalejdoskopa bildo de ĉi tiuj mondoj certe ne estas homogena rilate la uzon de la angla, sed eblas kunmeti bldon, multvizaĝan, de la tipaj rolmodeloj.

Kio do estas la objekto de la anglalingvemo? Eble tro facile fluas al ni la respondo, ke ĝi estas la Nordo, pli riĉa kaj potenca ol niaj sudaj socioj. La realo estas, aŭ komencas esti, multe pli kompleksa. La kreantoj de ideoj gravaj por Bharato pli kaj pli ofte estas modernaj bharatanoj, agantaj originale. Tiuj bharatanoj ne ĉiam estas mem ŝikaj aŭ iel ajn mondumaj. Sed ili, plus la monda metropolo aŭ la Nordo, konsistigas la modernan kulturan objekton, kiun nia novonda mondumo strebas posedi kaj iagrade peri al la bharata popolo ĝenerale. Laŭ mi gravas konkrete pensi al la homoj, kiuj kreadas la sencon de la moderno, kaj nomi tiujn homojn la objekto de nia anglalingva ondo.

La fakton, ke nur la angla ĝis nun funkciis kiel elita unuecilo por la moderna Bharato, komencas subfosi la kreskanta akcepto de la hindia kiel nefor-

malilo, kiel ilo por esti neformala. La aktuala monda fono, kiu ekde la sesdekaj jaroj komencis substreki ĉian evoluon en la neformaleco, igas nin aparte atenti la uzon de la hindia ĉe la eleganta mondumo en Bharato. Ĉiuj diras, verŝajne prave, ke la industrio en Bombajo kaj Madraso produktanta popularajn filmojn en la hindia lingvo, kun la eĥoj de tiu fenomeno en la klaĉa gazetaro, televidaj programoj, popularaj festoj, kaŭzas la neformalan kreskon de la hindia. La popola rezisto kontraŭ la hindia en ŝtatoj kun prifierata literatura lingvo tre diferenca de la hindia, precipe en sudaj ŝtatoj kaj Okcidenta Bengalio, restas forta bremsa faktoro. Sed atendeblas, ke post kelkaj jardekoj la hindia estos jam sufiĉe konata ĉie en Bharato. Tiam la propono enkonduki ĝin por oficiala kaj elita uzo, iom post iom anstataŭi per ĝi la anglan, verŝajne vekos malpli da opono. Nuntempe la hindia simple komplementas la anglan, apenaŭ minacante ĝin.

Preter la du bharataj ligo-lingvoj, ja ekzistas bezono bone lerni la propran lingvon, kaj kapablo ĉe la instruistoj bone instrui ĝin. Ial, tiu cirkvito tamen ne funkcias. Ne kreskas la zorgo pri uzado de la propraj lingvoj. Multaj trovas la situacion iom malsaneca, sed opinias, ke ĝi restos neevitebla, dum la lernantoj devos konstante vivi sub la premo de du malfacilaj sed nepre lernendaj malpropraj lingvoj. Kaj la publiko ial opinias, ke tiu premo estas eterna, ke la problemo ne havas racian solvon.

Probal Daŝgupto

Lingvaj problemoj mortigas en Goa

La ekzisto de la angla kaj la hindia kiel interlingvoj por Bharato ne signifas, ke lingvaj problemoj malĉeestas. Fine de la pasinta jaro, la brita ĵurnalo *The Guardian* (La gardanto) raportis pri lingva disputo en Goa, hejmgregiono por unu miliono da homoj sur la okcidenta marbordo. Almenaŭ ses homoj mortis en bataloj inter subtenantoj de rivalaj lingvoj.

Dum longa tempo portugala kolonio, Goa estis reprenita de Bharato en 1961. Ĝi nun frontas sendependiĝon kiel la dudekkvina ŝtato en la bharata respublika sistemo, sed por tio la loka parlamento devas elekti oficialan ŝtatan lingvon. Kaj jen la problemo. Naŭdek naŭ elcent de la loĝantoj parolas la konkanan, lingvon senalfabetan kaj cetere sisteme malhelpatan dum la portugala rego. Tamen la gvidantoj de la liberiga movado, kaj plimulto de la hindu-kredantoj de la regiono, prefere uzas la maratan, lingvon de najbara ŝtato kiun la portugaloj enkondukis en goaajn

lernejojn.

La lingva problemo en Goa iel fariĝis la fokuso de la demando pri sendependeco. Jam antaŭ dek jaroj la Goa-anoj malakceptis unuiĝon kun la marata-parolanta najbara ŝtato, Maharaŝtro, kaj subtenantoj de la konkana timas, ke akcepto de la marata donos tro da influo al tiu ŝtato. Laŭ la Ministro pri Turismo kaj Urba Evoluo, d-ro Luis Proto Barbosa: "Se ni havos la konkanan kiel nian oficialan lingvon, ni havos nian identecon." Sed la por-marata flanko estas forte reprezentata en la parlamento, kaj la registaro tre malvolonte frontas rekte la problemon.

Dume, konkananoj demonstras en la stratoj, baras la ŝoseojn, kaj batalas kun la maratanoj kiuj reagis kontraŭ ili... En decembro, okaze de la plej sangaj konfliktoj en kiuj pluraj homoj mortis aŭ estis vunditaj, kelkaj miloj da soldatoj kaj policianoj estis senditaj de najbaraj ŝtatoj por restarigi la pacon.

Semajno de Internacia Amikeco

Ni ekbruligas la flamon de amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj.

Por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni promesas labori por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo, Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj.

Tiel Erik Carlén, forpasinta, karmemora aktivulo sur diversaj esperantistaj kampoj, konceptis la esencon de sia iniciato, la Semajno de Internacia Amikeco. Oni devas konstati, ke la Semajno, festata ĉiujare dum la lastaj plena semajno de februaro (mezurita de dimanĉo ĝis sabato, do ĉi-jare de la 22a ĝis la 28a), neniam plene enradikiĝis en la esperantista komunumo. Kelkaj individuoj kaj organizaĵoj propagandas la Semajnon en sia loka medio, sed tiuj iniciatoj restas iom nekoheraj kaj ne multe disvastiĝas.

Kial la Semajno estas grava? Ĉar ĝi celas du aspektojn de la Esperanto-movado, kiuj helpas ĝin difini kaj plifortigi. Unu estas plivigligo de kontaktoj inter esperantistoj en diversaj landoj; la alia, la konscia ligado de Esperanto kun nemovadaj rondoj. Ambaŭ tiuj celoj instigas niajn grupojn kaj membrojn rigardi ekster sin al la pli vasta mondo; kaj tio estas saniga fenomeno en iu ajn socio aŭ movado.

Per tiu ĉi paĝo, aperigita honore al la jubilejara SIA, ni volas kuraĝigi niajn legantojn diskuti ĝin, taksi ĝian valoron, kaj komenci plani por la venontjara (21a-27a de februaro 1988). Ebla tuja paŝo estus nomi lokan kunordiganton de la Semajno kaj informi UEA kaj Internacian Societon de Amikeco kaj Bonvolo (vd. adreson sube). Se venos pluraj proponoj, ni denove traktos la temon post kelkaj monatoj. Ankaŭ raportoj pri la ĉi-jara SIA estas bonvenaj!

(Ni dankas al Manŭelo Kampanjaña, prezidanto de Otava Esperanto-Ligo, kiu jam sendis al ni la tekston de la jubilejara urbestra proklamo pri SIA en la kanada ĉefurbo.)



Sugestoj pri agado dum la Semajno de Internacia Amikeco

1) Unuopaj esperantistoj

- a) Sendu amikajn salutojn dum la Semajno al gekonatoj, ne nur al esperantistoj sed ankaŭ al aliaj.
- b) Atentigu pri la ekzisto de la Semajno per letero al via loka ĵurnalo, aŭ en aliaj societoj en kiuj vi estas membro, kaj instigu aliajn personojn kune festi.
- c) Partoprenu la lokajn kunvenojn (vd. sube).

2. Lokaj Esperantaj grupoj kaj societoj

- a) Aranĝu publikan kunvenon. Invitu precipe la junularon. Invitu la urbestron aŭ alian eminentulon por paroli. La esperantistoj faru mallongan prelegeton pri Esperanto kaj pri ĝiaj ebloj krei amikecajn kontaktojn inter diversaj popoloj. Kompreneble tia kunveno povus havi multajn diversajn formojn, kaj tiu menciita ĉi tie estas nur unu tia sugesto.
- b) Dum unu el la vesperoj de la Semajno, aranĝu privatan amikecan feston por la klubo. La klubo sendu salutkartojn al kluboj en aliaj landoj.
- c) Presigu afiŝojn. La teksto estu nacilingva kaj priskribu la Semajnon. Tiajn afiŝojn oni povas disdoni al

butikoj, kun peto, ke oni montru ilin en la butiko antaŭ kaj dum la Semajno.

ĉ) Petu eminentulon fariĝi protektanto de la Semajno en via regiono.

d) Sugestu al via urbestro, ke li/ŝi organizu ian eventon kunlige kun la Semajno. Se la urbo havas ĝemelajn urbojn en aliaj landoj, aranĝu interŝanĝon de salutoj inter la urbestroj, prefere per Esperanto, en kunlaboro kun la Esperanto-grupoj en tiuj urboj.

e) Atentigu viajn lokajn lernejojn kaj preĝejojn pri la ekzisto kaj celo de la Semajno, kaj sugestu, ke oni enplektu la Semajnon en siajn lecionojn, predikojn ktp.

f) Persvadu la urbestron oficiale proklami la Semajnon speciala semajno en la vivo de la urbo, kaj menci la internacian amikecon en siaj paroladoj.

g) Nepre raportu pri via agado al la Centra Oficejo de UEA Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, kun kopio al la Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo, P.O. Box 756 Shelby, NC 28150-0756 Usono. Sendu raportojn ankaŭ al taŭgaj Esperantaj gazetoj, kaj en nacia lingvo al la lokaj ĵurnaloj.

Esperanto en Afriko: la Jubileo kaj poste

Simpla titolo super tiu ĉi artikoleto— sed komplika temo! Ni povas distingi almenaŭ kelkajn apartajn subtemojn, koncize kaj nekomplete.

La lingvo-situacio en Afriko

La famo pri multlingveco en Afriko estas grava kaj prava. Pri la lingva bunteco kaj la kultura riĉeco en pasinto kaj nuntempo oni povas konsulti bibliotekojn da interesaj libroj. Estas miraklo ke Zamenhof ne naskiĝis en Afriko! En kiu loko surtera oni trovas tiom da diverslingveco?

La "veraj problemoj" de Afriko

Ne mankas tiuj, kiuj estas tiel impresataj de la ekonomia mizero de Afriko, ke nur tiun mizeron ili agnoskas kiel "la veran problemon". La diro estas ofte aŭdata: "Kial okupiĝi pri kulturo, lingvo, interkompreniĝo, se homoj mortas en la strato pro malsano, malsato kaj milito?"

Karaj diskutantoj: ni ne dubas pri via sincereco. Sed ĉu ni ne lasu al la afrikanoj mem difini siajn problemojn? Se al ili plaĉas diskuti pri idealoj de interkompreniĝo, de kunlaborado, de sendependiĝo, de kultura aŭtonomio eĉ kun malplena stomako, ĉu ni devigu ilin unue manĝi antaŭ ol diskuti?

Tiuj, kiuj memoras la fruan evoluon de la socialisma movado en Eŭropo, eble malpli miras pri la fenomeno, ke materia malriĉeco ne malhelpas la soifon al spirita riĉeco.

Kial Esperanto enkondukiĝu en Afriko?

Kial ne? La lingvo-situacio en Afriko estas minimume tiel ĥaosa kiel en Eŭropo, kaj la bezono pri intergenta komunikado minimume tiel urĝa. La ideo uzi Esperanton estas minimume tiel stranga por la Eŭropa Komunumo kiel por la Organizaĵo de Afrika Unueco. La argumentoj elfoseblaj kontraŭ tiu ideo estas same (ne)raciaj en ambaŭ situacioj.

La granda, ĉefa, esenca malsameco inter Eŭropo kaj Afriko estas, ke la dua havas amarajn spertojn kaj ĝiseterajn fimemorojn pri superregado, interalie kultura kaj lingva. La unua, male, ĝenerale ne konscias pri la kolonia situacio en kiu ĝi vivas. Kompreneble, estas grandaj diferencoj inter individuoj. Sed la socio kiel tuto en Afriko por ĉiam brulstampiĝis de la travivo de koloniismo, dum la blanka mondo vivas multe pli senkonscia pri la misuzado de potenco.

Do, baze por Esperanto la grundo devus esti pli fekunda en Afriko ol en Eŭropo.

Kial Esperanto enkondukiĝu en Afriko?

Jen ni eniras la zorgojn de "nun kaj ĉi tie". Niajn ĉiutagajn laborojn por instrui koresponde, por trovi eksterafrikajn ĝemelontojn, por kolekti monon. Ni nun havas "novan historion" (post epoko, kiun karakterizis kuraĝaj sed efemeraj elpaŝoj de individuoj) de ses jaroj. Tiu periodo jam konas du ŝtupojn: la ekiran unuan, kaj la duan, kiu jam daŭras kvar jarojn. Ni devos baldaŭ eniri trian ŝtupon, kiu daŭros tre multajn jarojn.

La unua ŝtupo estis tiu por fari la komencajn kontaktojn. La noveco de Esperanto kaj la allogo de ĉio, kio venas el la riĉa mondo, kaŭzis ke tiuj unuaj kontaktoj rapide realiĝis, senprobleme, senpene. Tiu ŝtupo rezultigis aron da entuziasmaj lernantoj. La dua ŝtupo konsistas el la enplekto de tiuj lernantoj kaj finlernintoj en la movadon. Tio jam estas multe malpli facila, ĉar ĝi dependas de la kunlaboremo de la movadanoj. La ĝenerala interesiĝo pri kontaktoj kun Afriko estas kuraĝiga, sed tamen ne sufiĉa. "La movado" ne estas disciplinita taĉmento, direktebla al tiu aŭ alia batalfronto. La eroj de la movado estas bonvolaj samideanoj, kiuj tamen neniel estas pretaj foroferi siajn vivon kaj kapitalon al Esperanto. Ne ĉiuj estas similaj al Zamenhof.



Amika manpremo inter Afriko kaj la cetera mondo. Tiu sopiro je "amikeco trans limoj" ne malaperas pro malsato nek limiĝas al iu aparta nacia kulturo...

Sekve, la dua ŝtupo kreis ligis multajn ligojn inter afrikaj kaj eksterafrikaj esperantistoj, kaj rezultigis iugrade kontentigan utiligadon de la lingvo. La malproksimeco, la izoliteco kaj la malriĉeco de la afrikaj lernintoj tamen kaŭzis, ke tiuj ligoj kaj utiligadoj estis preskaŭ ekskluzive perpoŝtaj. Korespondado estas bela, bona, riĉiga, sed finfine la interhoma komunikado konsistas el pli ol tio: el kongresado, gastloĝado, klubumado; kiom da esperantistoj en

Eŭropo restis fidelaj simple ĉar ili nenie povis kongresi tiel amuze kiel en Esperantujo?

La Jubileo kaj poste

Sekve, ni nun staras antaŭ la tria ŝtupo: la densigo de la esperantista vivo interne de Afriko kaj en la mondaj movadaj kadroj. Por tio ni bezonas intensigon de la interrilatoj kun la afrikaj pioniroj. Se tiuj povos ĉerpi pli da utilaj kontaktoj, pli da instru-kompetento, pli da movada profesieco el nia esperantista socio, ili povos per tiuj spertoj plukonstruadi afrikan movadon. Ju pli densiĝos la movado en Afriko mem, des pli ĝi donos utilon, kaj sekve: lernokialon al aliaj afrikanoj. En tiuj ĉi jaroj, precipe en la Jubilea Jaro, ni devas ĝis maksimumo "enplekti" niajn malproksimajn geamikojn. Ni devas inviti ilin al la "grandaj festoj", por ke ili sentu ke ili estas inter ni kaj apartenas al ni. Nenio estus pli malvarma ol aranĝi belajn kongresojn en Pollando por la najbaroj de Pollando kaj kelkaj riĉuloj, kiuj povas pagi la festenon, kaj lasi la aliajn ekstere.

Partoprenigi do kiel eble plej multajn afrikanojn, ĉinojn, kubanojn, srilankanojn, irananojn, hin-

Afrikaj lingvo-problemoj

Afriko havas trioble la grandecon de Eŭropo: 30 000 000 km; sed ĝi havas nur la duonon de la loĝantaro de Eŭropo: iom malpli ol 280 000 000. Tamen la popoloj de Afriko parolas sume ĉ. mil lingvojn, kun kio oni povas kompari la ĉ. sesdek lingvojn de Eŭropo. Pli ol 62 milionoj da homoj en Afriko parolas la araban, t.e. unu kvarono de la loĝantaro (troviĝas 120 milionoj da islamanoj en Afriko). 48 milionoj da homoj parolas kiel sian unuan lingvon unu el kvin aliaj lingvoj: laŭ ordo de graveco, la lingvojn haŭsan, amharan, svahilan, joruban, zulu-an.

La kreo de kolonioj en Afriko, regataj el Eŭropo, tendencis kompliki la lingvan situacion pli ol ĝin simpligi. La eŭropanoj senescepte enkondukis sian propran lingvon por ĉiuj administraj celoj (krom, en kelkaj kazoj, je la plej malalta nivelo de la hierarkio), tiel plifortigante la lingvan diversecon kaj konfuzon. Misiistoj, sub protekto de la *Pax Europea*, fondis lernejojn, en kiuj ili instruis siajn lernantojn skribi kaj legi la metropolan lingvon, ne la regionan, aŭ, male, la lokan triban lingvon, ne la komerclingvon en multaj kazoj jam ekzistantan por intertriba komuniĝado en la regiono. Ekzistantajn lingvajn teritoriojn dudividis la konataj konferencoj de Berlino, kelkfoje eĉ tridividis, tiel ke parolantoj de la Kongo-lingvo trovis sin en belga, franca kaj portugala teritorioj, parolantoj de la Azande-lingvo en belga, franca kaj anglo-egipta teritorioj, parolantoj



Esperanto-grupo el Ebura Bordo. Ĉu UEA sukcesos kongresi en Ahiĝano en 1990? Vd. Kongresan Komunikon (p.38) pri afrikanoj en la ĉi-jara UK.

dojn, latinamerikanojn, eĉ se tio kostas multan monon al ni — (plejparte) eŭropaj bonstatciaj burĝoj.

Krome: al tiuj kiuj ne partoprenas fizike, sendi la mesaĝon ke ili spirite estas inter ni. Ne devus esti eĉ unu unuopa esperantisto kiu ne iel ajn partoprenos la kongresojn. Kiel organizi tion? Simple: doni prioritatan atenton al tiu problemo kaj funkciigi la fantazion — organon ĝenerale subevoluintan ĉe homoj.

de la somala en brita, itala kaj etiopa teritorioj, parolantoj de la fula en brita, franca kaj germana teritorioj.

Aliflanke, la koloniaj administracioj kreis ankaŭ unuecon, kie antaŭe unueco ne ekzistis. La francoj kaj la portugaloj malakcelis la uzon de ĉiuj lokaj lingvoj, permesante instrui nur la francan aŭ portugalan en lernejoj. La fervojoj kaj la ŝoseoj forigis multajn barojn de distanco kaj pliintensigis la komercon. La firme trudita konservo de leĝobservo kaj ordo kreis senprecedencan staton de paco inter la triboj, tiel ke interŝanĝado de varoj fariĝis ebla, eĉ ofta.

Minejoj kaj, en malpli forta grado, farmbieno kaj plantejoj iĝis kvazaŭ magnetoj por miloj da afrikanoj. Ili svarmis en la regionojn, kie eŭropanoj kreis novajn produktocentrojn. Tie ekestis tute nova sociolingva situacio, kaj plej ofte la komuna lingvo ekuzata inter la laboristoj kaj iliaj eŭropaj dungantoj estis aŭ ne indiĝena al tiu regiono aŭ miksitaj (kreoligitaj) lingvoj. Tiel la svahila fariĝis la interlingvo de la provincoj Katango kaj Kivu, la lingala en Leopoldville. "Min-kafra" idiomo, en diversaj variaĵoj, estis uzata en grandaj partoj de suda kaj centra Afriko, angla kreolaĵo en Sieraleono kaj aliaj partoj de la okcidentafrika marbordo.

Tre malmultaj afrikanoj travivis la tutan procezon de eŭropigo. La plimulto partoprenis nur la flankajn avantaĝojn, kiel ekzemple dungitecon kaj sekurecon. Ili adoptis nur fragmentojn de eŭropa kulturo kaj lingvo: ilia propra kulturo restis grandparte "triba" kaj netuŝita.

Iam UEA lanĉis la eblecon simbole aliĝi al kongreso. Aliaj eblecoj estas registri la kongreson (kaj ne nur la oficialaĵojn!) fote kaj sonbende, kaj amase dissendi tiujn kongresimpresojn. La kongresanoj persone envolviĝu kaj sendu el la kongreso salutkartojn, salutbendojn, salutfotojn, salutmemoraĵojn, salutkisojn al la amikoj, la neĉeestantoj en ĉiuj malproksimaj anguloj de la mondo. Kaj tiel plu. Estas relative facile elpensi kaj organizi tion, se nur la motivo de solidaremo estas forta. Organizati bankedon estas pli malfacile ol tio.

Tiom pri la Jubilea Jaro. Sed tiu partoprenigado restos necesa ankaŭ postjubilee. Konkretaj manieroj por tio estas la "ĝemelado" (sistemo de perpoŝta interligado de afrikaj kaj eksterafrikaj samideanoj kaj kluboj) kaj la kongresado en Afriko. Ĉu vere la UK estos en Abiĝano en 1990?

La vivon riĉigu per riĉigo de aliaj

Tiu ĉi ŝtupo bezonas la daŭran entuziasmon kaj partprenemon de la homoj en la movada centro: en Eŭropo kaj iuj aliaj landoj kie Esperanto estas forta. Kaj: la monon. Ni konsciu, ke la paŝo farita en

Ĉirkaŭ la jaro 1960 Afrikon trafis sendependiĝo, kaj trafis neatendite.

La novaj naciaj registaroj devis fari decidojn pri siaj naciaj lingvoj. En iuj kazoj ili decidis favore al la ekzistantaj interlingvoj (la svahila en Tanzanio, la



Foto: Unesko/Arthur Gillette

Kapro-bredado en Togolando. Eĉ tia ekonomia agado postulas scion pri skribado kaj kalkulado.

araba en Sudano); en la plimulto de la landoj la ekzistanta eŭropa lingvo estis simple deklarita la oficiala lingvo de la nova ŝtato. Fari decidon kaj ĝin efektiviĝi estas du malsamaj aferoj. Oficiala lingvo ne fariĝas efektive la lingvo de la nacio, antaŭ ol ĉiuj ŝtatanoj ĝin posedas, sed en kelkaj landoj nur malgranda malplimulto scipovas ĝin (la francan en la

1980 havos konsekvencojn dum jardekoj: ĉiam kolektadi monon, imposti la pagipovajn esperantistojn. Tio estas "nia" evoluhelpo — vorto cetere misnocia.

Sed kiu sentus tian imposton kiel ŝarĝon, se oni vidas kiel ĝi ebligas la homan amikiĝon, solidarecon, feliĉon? Tia imposto ne estas ŝarĝo sed plezuro. Tio ankaŭ validas por la tempa investo, kiun postulas la agado por enkonduki Esperanton transmare. Oni ne korespondas, instruas, organizas kiel sinŝarĝon, sed kiel plezuron. Trafe tion diras letero de unu el niaj kunlaborantinoj:

Mi povas konstati ke la diversaj kontaktoj estas por mi ĝojplenaj. Ho jes, kostas multe da energio, laboro, tempo. Sed mi estas feliĉa ke mi iomete povas helpi ilin en la strebado lerni pli, kompreni pli, kaj ebligi al ili kontakti per Esperanto vastan aron da informantoj aŭ amikoj ĉie en la mondo. Tio estas pozitiva laboro! Mia vivo riĉiĝas pro la kontakto kun tiuj junuloj en diversaj afrikaj landoj.

Karaj geamikoj, Esperanto ESTAS mirakla afero.

H. Bakker

antaŭe belga Kongolando regas nur ĉ. 2%, la anglan en Kenjo eble 4%). Klerigo, eĉ "alfabetigo" en la nacia lingvo ankoraŭ estas nenie grandskale lanĉita kun sukceso, kaj la ŝancoj de ĝia eventuala estonta sukceso je tutlanda nivelo ne nur ne pliheliĝas, sed eĉ malheliĝas. Krom la ĉiam pli severa manko de kvalifikitaj instruistoj je ĉiuj niveloj, nun haveblas malpli da mono por elspezo je klerigo, ol haveblis antaŭ kelkaj jaroj.

Paralele kun la velkado de klerigaj eblecoj, degeneras ankaŭ la teknika edukado, pro la samaj kialoj, kaj tio siavice reduktas la nombron de la kvalifikitaj teknikistoj, kiujn Afriko tiel forte bezonas. Dum iom post iom la eŭropaj kaj hindaj teknikistoj kaj metiistoj trovas laboron aliloke, aŭ eĉ estas forpelataj pro la kampanjo de "afrikanigo", la teknikaj servoj, kiuj estis enkondukitaj kun eŭropa regado, tendencas ĉiam malpli efike funkcii.

Laŭ la nuna aŭtoro, evoluo el tiu situacio daŭros jarcentojn anstataŭ jarojn. Unu leĝo de la historio ŝajnas universale validi: tio, kion oni antaŭenigas aŭ eĉ devigas de ekstere, ne daŭros; daŭremaj kulturaj establaĵoj povas disvolviĝi nur ene de la landoj mem. Se lingvoj estus sukcese altrudeblaj, Eŭropo ankoraŭ parolus la latinan. Kaj en nia moderna epoko de individuismo, tiu spirito de "ĉiu por si mem" estas pli disvastigita ol iam antaŭe depost la romia imperio. Se unueco kreiĝos, kaj kun ĝi unueciga lingvo, estos nur pere de nova idealo, ĉar la homoj agas laŭ siaj propraj kredoj, ne laŭ la ordonoj de aliaj.

Jan Knappert

Armeo da interpretistoj kostas milionojn al EK

Kompare kun la lingva diverseco de Afriko aŭ Hinda Unio, kvardeko da eŭropaj lingvoj apenaŭ impresas kiel granda nombro. Sed la kreskanta interplektiĝo de eŭropaj landoj — ekzempligita per la Eŭropa Komunumo, kiu lastatempe plivastiĝis ĝis 11 landoj kaj naŭ lingvoj — reliefigas kaj pliintensigas jam ekzistantajn lingvoproblemojn. La jena artikolo, ĉerpita el nederlanda gazeto Het Vrije Volk (La libera popolo), 1986 12 12, montras kiel konscio pri la problemo penetras eĉ la amaskomunikilojn...

Bruselo — Se "parolo estas arĝento, oron similas silento", efektive por la Eŭropa Komunumo silentado produktus oron. Sekvontjare EK elspezos pli ol 1,7 miliardojn da guldenoj por tradukistoj kaj interpretistoj perantaj inter la naŭ lingvoj, je kiuj riĉas la Eŭropa Komunumo. Kvankam tiu sumo konsistigas nur du procentojn de la tuta buĝeto, ĝi tamen pli reliefigas se ni komparas ĝin kun aliaj elspezoj. Ekzemple, ĝi konsiderinde superas la pli ol 1,2 miliardojn da guldenoj, kiujn EK elspezos dum 1987 por nutrohelpo, kaj je preskaŭ 80 milionoj da guldenoj superas la sumon rezervitan por esploro pri novaj teknologioj.

La Eŭropa Parlamento sola jam elspezas la duonon de sia buĝeto, pli ol 340 milionojn da guldenoj, por la tradukado de dokumentoj kaj interpretado ĉe debatoj. La altecon de tiu sumo rezultigis i.a. decido de la Parlamento en rezolucio de 1982, ke ĉiuj lingvoj de la Komunumo estas "absolute samvaloraj". Limigo de la nombro de la komunumaj lingvoj laŭ la rezolucio "damaĝus la demokratan karakteron" de la Parlamento. Por la debatoj la Eŭropa Parlamento dungis 440 interpretistojn, kaj pliaj 400 tradukistoj okupiĝas pri ĉiuj skribaj aktoj. EK uzas komputilon por dividi ĉiujn 350 plenokupajn interpretistojn inter la kunvenoj kaj renkontiĝoj en Bruselo kaj la cetera mondo.

Entute triono el la 9 000 funkciuloj en la Ĉefa Oficejo de la Eŭropa Komisiono faras lingvan laboron. La Komisiono devas dividi ĉi tiun armeon da tradukistoj kun la Eŭropa Ministra Konsilio, kiu mem dungis kromajn 720 tradukistojn.

Pro la pliampleksiĝo de EK kompreneble ankaŭ la nombro de la interpretistoj bezonataj same pliiĝis. Kiam EK ankoraŭ havis ses membrojn, por kunsido necesis po dek tri interpretistoj, nun oni bezonas po tridek. Ankoraŭ en 1985 la Eŭropa Komisiono avertis, ke la plivastiĝo de la Komunumo sekvigis neeviteblajn problemojn, sed ĝi nepre ne riskis

proponi limigon al la lingvonombro. En la koncerna notico oni rimarkigas, ke lingvo ne estas afero sole meĥanika, sed ĝi "enhavas ĝuste la kulturajn kaj intelektajn valorojn, kiuj formas la teksaĵon de la Eŭropa Komunumo."

Ne troviĝas inter la taskaro de la Eŭropa Komisiono "atenci kontraŭ tiu varieco", laŭ deklaro de la Komisiono. Ĉiel ajn tiu idealismo ne povas fornebuli la fakton, ke pro la lasta vastiĝo de la Komunumo per Hispanio kaj Portugalio efektive ekestis malfacilaĵoj. Laŭ Marco Benedetti, alta funkciulo ĉe la traduka fako de la Komunumo, la Komisiono pli kaj pli uzas "stafetan tradukadon", kie parolata teksto ne plu estas tradukata tuj rekte, sed sinsekve de unu lingvo en alian. Tio jam fariĝis kutimo ĉe kunvenoj, en kiuj ĉiuj lingvoj de la Komunumo estas parolataj, kaj ĉiam pli okazas tiel ankaŭ ĉe kunsidoj, kie estas uzataj malpli da lingvoj. Tradukaj spertuloj de EK tamen agnoskas la fakton, ke pro tiu tekniko la ebloj de eraroj kaj miskomprenoj kreskas eksponente.

La tuj-tradukado en kunvenoj de la Eŭropa Komunumo povas esti okupo mens-laciga. Krom atenti detalojn pri internaciaj problemoj, la interpretistoj



Lingvoj en la regiono de la Eŭropa Komunumo. Kelkaj ankoraŭ batalas por ekzisto ene de la propra lando

devas pasigi multajn horojn ĉe kunsidoj de komisionoj kaj sub-komisionoj pri tedaj temoj ekonomiaj kaj agrikulturaj, vere interesaj nur por la fakuloj. La interpretistoj ofte fieras pri sia rego de teknikaj terminoj kaj sia eltenado: la kunsidoj daŭras ofte ĝis malfrua nokta aŭ eĉ frua matena horo.

Tamen — laŭ unu el la interpretistoj, anonima, laŭ komprenebla prefero — iam kaj tiam okazas, ke interpretisto perdas la memregon kaj iom pligajigas alparoladon tro enuigan. Laŭ nia informinto, la interpretistoj tiam volonte uzas terminon nepre absurdan aŭ eĉ fi-vortojn, sed "nur malmultaj membroj rimarkas la diferencon", li aldonas. Okazas foje ankaŭ eraroj neintencaj, sed kun same spektakla efi-

ko. En novembro 1986 la Eŭropa Parlamento akceptis rezolucion por asigni 50 000 ekuojn* por starigi "tuj-brigadon" (angle: flying squad) de fraŭdkontrolistoj. Sed unu el la parlamentaj interpretistoj, momente senatenta, titolis la novan korpuson "firing squad", la angla termino por "ekzekuta ploto".

* Ekuj: la monunuo de EK.

ĈINIO

Putonghuo: interlingvo por la 56 ĉinaj nacioj

Jen estas ĉina monbileto. Sur ĝia fronto estas presite "Ĉina Popola Banko" kaj "unu juano" en ideogramoj, kiuj estas nomataj *hanzi* (vortunuoj de han-lingvo), dum ĉe la maldekstra supra angulo estas presitaj tekstoj en kvar lingvoj. Ĉiuj tekstoj havas la saman signifon: ĉina popola banko, same kiel tiu presita en ideogramoj. La kvar lingvoj laŭvice estas: mongola, tibeta, vigura kaj ĝuanga, inter kiuj la unuaj tri havas tre longan historion kaj antikvan skribmanieron en mongola, tibeta kaj araba alfabetoj, nur la kvara estas iniciatita post la fondo de la Popola Respubliko kaj realigita per latinaj literoj. Sur la dorsa flanko de tiu monbileto legeblas "Zhongguo Renmin Yinhang" en pinjino (skribsistemo en latina alfabeto por hanzio, la ĉina ideogramaro) kaj "yi yuan" (ankaŭ en latiniga fonetika skriba lingvo). Tiuj ĉi du esprimoj signifas respektive "Ĉina Popola Banko" kaj "unu juano".

Do antaŭ niaj okuloj troviĝas monbileto kun kvin lingvoj egalsignifaj kaj eĉ kun ses skribmanieroj; tia bileto estas eble unika aŭ almenaŭ rara specimeno en la historio de monda papermono, kiel monbileto kun socilingvistika signifo. Tiu ĉi fakto klare montras al la publiko ke Ĉina Popola Respubliko estas lando konsistanta el multaj nacioj, kiuj havas siajn proprajn lingvojn kaj ĝuas egalan politikan rajton.

La granda familio de la ĉina popolo konsistas el 56 nacioj, el kiuj la plej granda estas la hana, 93,3% de la loĝantaro. Dume la ceteraj 55 minoritatoj okupas nur 6,7%, inter kiuj nur 20 nacioj posedas siajn proprajn skribajn lingvojn, kaj 35 nacioj posedas nur parolajn lingvojn sen skribo. Tamen en la han-nacia regiono oni parolas tre diversajn kaj tre malsimilajn dialektojn, kaŭze de kompleksaj faktoroj de socia, historia kaj ekonomia evoluado. Laŭ grandskala enketo (1956-1958), troviĝas sep kategorioj de dialektoj en la hana lingvo. Oni eĉ ne povas kompreni unu la alian parolante siajn dialektojn. Sed dum pasintaj longaj jaroj oni interkomunikas per skriba lingvo, hanzio, kiu restas sama por la diversaj dialektoj.

Ĉi tie mi volas diri, ke la bazo por lingva egaleco estas la nacia egaleco. La Konstitucio (1982) garantias la egalecon de ĉiuj nacioj enlandaj, kaj la rajton realigi la regionan aŭtonomion de la minoritatoj nacioj. Por faciligi kaj konvenigi la komunikadon inter la enlandaj nacioj egalrajtaj, la Konstitucio enhavas, ke "La ŝtato disvastigas *putonghua* tra la tuta lando" (Art. 19). La termino *putonghua* (= putonghuo) signifas "ĝeneralan parolon" aŭ "ĝeneralan parol-lingvon" laŭlitere; esence ĝi signifas la komunan parollingvon de la hana nacio. La artikolo supre citita havas jenajn sencojn:

1 La hana lingvo servas kiel komuna interkomunikilo por ĉiuj nacioj tra la tuta lando; ĝia parola lingvo (putonghuo) servas kiel interkomunikilo por socia komunikado.

2 Putonghuo servas kiel interkomunikilo por ĉiuj dialekto-parolantoj de la hana nacio por rompi la baron de diversaj dialektoj tra la han-nacia regiono.

3 La hana/putonghuo servas kiel tutlanda aŭ tutnacia komunlingvo por interkomuniki kun fremdaj landoj. Putonghuo estas tia parola lingvo de la hana



nacio, kiu baziĝas fonetike sur pekina prononcado (elparolo), kaj leksike sur nordĉina dialekto kiu okupas plej vastan teritorion de la han-nacio.

Apude de la Konstitucio (1982), Leĝo pri Minoritata Regiona Aŭtonomeco (1984) konstatas, ke ĉiu nacio en la kadro de la Popola Respubliko havas egalan rajton paroli, skribi, instrui kaj utiligi sian propran nacian lingvon, sed samtempe oni rekomendas ke ĉiu nacio libere lernu la hanan/putonghuon kiel interlingvon. En la jaro 1986 Leĝo pri Deviga Edukado enhavis: "Ĉiuj lernejoj devas disvastigi kaj paroli putonghuon." (Art.6). Efektive jam nun en universitatoj la instrua lingvo estas putonghuo, kaj en preskaŭ ĉiuj elementaj lernejoj oni jam instruas kaj komunikas per putonghuo anstataŭ diversaj dialektoj. Oni jam konscias ke dialektoj estas produktaĵoj de fermita socio sub feŭdismo, kaj ke ili ne taŭgas kiel interkomunikilo en malfermita socio — precipe dum la nuna informada epoko.

Chen Yuan

Ĝis la fina malvenko

Kvankam specialisto nur pri juriko kaj internacirilatiko, mi gratulas pro la unika lingvika (tiuj du ikoj ne estas samsencaj) artikolo en la decembra "Esperanto" (p.211-212). Fakte, mi intencis tiucele *distancsoni* al vi, sed bedaŭrinde la *distancsonilo* montriĝis difektita. Sekve mi volis veturi per mia *kvarrada* (diference de la duradaj) *memmoviĝilo* al la poŝtoŝicejo por sendi al vi gratulan *distancskribiĝon*. Montriĝis, ke bedaŭrinde la *moviĝilo* de mia *kvarrada memmoviĝilo* pro frosto ne povis *komen-ci*. Tial restas por mi nenio alia, ol skribi tiun ĉi gratulan leteron.

Kiel vi vidas, ĝi ne estas plene infektita de "eŭroplingvanoj", sed almenaŭ parte skribita en la alte evoluinta monda Esperanto, kiun komprenas ankaŭ la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, inkluzive la redaktorojn de "El Popola Ĉinio", "Oomoto" kaj de aliaj bonaj Esperanto-periodaĵoj publikigataj en Azio, ĉar, evidente, ili ne scias, ke jurisprudenco estas juriko, telefono = *distancsono*, telefona aparato = *distincsonilo*, telegramo = *distancskribaĵo*, aŭtomobilo = *kvarrada memmoviĝilo* (eble necesas aldoni *kun aerblovitaj tuboj*), motoro = *moviĝilo*, starto = *komenco*, ktp.

Absolute brila, profunde scienca artikolo komence de la Jubilea Jaro, tre taŭga por inaŭguri la novan Esperanton de la dua jarcento de ĝia ekzisto ĝis la fina — malvenko.

Mi pardonpetas pro la uzo de multaj grekdevenaj kaj latindevenaj radikoj el la malnova "eŭropeeca" Esperanto en la supra teksto, sed vi certe komprenos, ke post nuraj kelkaj minutoj da studado mi ne povis plene ekregi ĝin.

Via ĝisnuna

Esperanto-analfabeto

(Pardonu: Esperanto-*neabocoulo*, aŭ konforme — *kunforme*? — al la principo de sufiĉo, *neaboulo*, eble eĉ *neabulo*!)

* * * *

P.S.

- (1) Tian "evoluo" mi antaŭvidis jam en la Aprila Artikolo de 1974. V. p-ojn 94-95 kaj 133 de *Hamburgo en Retrospektivo*. *
- (2) Neniu povas malebligi, ke lingvosciencaj analfabetoj diru aŭ skribu stultaĵojn, sed la organo de UEA devus ne publikigi tiaĵojn, des malpli, ĉar ili kreas lingvan ĥaoson kaj ege malutilas al Esperanto.

Ivo Lapenna (Britio)

*Havebla de la Libroservo de UEA (prezo 25,50 gld.).

KONKURSO DE LA POLA RADIO

Okaze de la datreveno de la komenco de ĉiutagaj Esperanto-elsendoj, la 4an de aprilo, Radio Polonia invitas siajn aŭskultantojn partopreni konkurson kun valoraj premioj. Oni devas respondi al la simpla demando: "Ekde kiam vi aŭskultas niajn elsendojn kaj kial vi ne rezignis?" La respondojn oni sendu al Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando, ĝis la fino de aprilo.

Savi skemismon per laŭbezona naturismo

Akiko Ŭusink-Nagata pledas por tio, ke oni pli skemisme kaj malpli naturisme faru novajn vortojn. Alivorte, oni uzu la ekzistantajn radikojn kaj la vortfarajn eblecojn de Esperanto por fari kunmetaĵojn kaj ne senpripense pruntu novajn radikojn por simili al eŭropaj lingvoj.

En si mem tiu sinteno havas laŭ mi multajn pozitivajn ecojn, kaj efektive Esperanto dum siaj cent jaroj multflanke evoluis laŭ ĉi tiu rekomendo. Tion ĝi faris, cetere, ne ĉefe pro ĉi tiaj pledoj, sed antaŭ ĉio pro la interna evoluivo kiu formas la "spiriton" de la lingvo, pri kiu cerbumis Zamenhof. Ŝajnas krome, ke multaj aŭtoroj, kiuj spertas Esperanton kiel vivantaĵon en ĉiutaga parola uzo, ankaŭ en skribado tendencas al skemismo pli ol aliaj, kiuj uzas la lingvon plejparte nur skribe.

Malgraŭ tio mi havas kelkajn objetojn kontraŭ la opinio de Nagata. Oni devas decidi inter du manieroj fari fakvortojn kaj entute fari novajn vortojn, kaj neniu el ili povas ekzakte kongrui kun ŝia pledo.

Nagata ilustras siajn tezojn ĉefe per terminoj el la fako gramatiko. Laŭ la tre vaste akceptata teorio de Ferdinand de Saussure gramatiko temas pri la lingva signo, kiu havas formon kaj signifon. Treege kutima fenomeno en la historio de ĉiuj lingvoj, ankaŭ de Esperanto, estas, ke gramatikaj formoj origine estiĝas kiel signoj de iu limigita signifo, poste fariĝas memstaraj kiel formoj kaj komencas esprimi ankaŭ aliajn signifojn, kaj tiun originan signifon ili esprimas krome ne plu ĉiam. Ekestas nekoincido inter formo kaj signifo.

Ĉi tiu fakto necesigas la eblecon paroli pri formo kaj signifo aparte, do havi apartajn terminojn por la kategorioj de formo kaj por tiuj de signifo. Tiu bezono kreskas, kiam oni studas kaj komparas plurajn lingvojn, tiel ke terminoj kiel *aseco* (kiu ja uzas la morfemon *as*, kiu ne ekzistas ekster Esperanto) fariĝas neuzeblaj.

Kiel do fari tiujn paralelajn terminojn? Unu modelo, kiun Nagata malakceptas kiel naturisman,

estas tiu de kelkaj eŭropaj lingvoj. Ili prenas "proprajn", ĉiutagajn vortojn por la kategorioj de signifo, kaj pruntitajn, pli fakajn vortojn por la kategorioj de formo. Tio eblas ankaŭ en Esperanto. Ekzemple: *tempo* estas signifa kategorio, dum *tenso* estas formo, kiu (interalie) esprimas tempon. Ĉar la prezenco ne ĉiam nur signifas estantecon, oni uzas du apartajn terminojn.

La alia modelo, kiun laŭ Nagata uzas la japana kaj la ĉina lingvoj (kaj ankaŭ kelkaj eŭropaj, ekz. la islanda), havas por ambaŭ termingrupoj proprajn radikojn. Nagata asertas, ke tio estas ankaŭ por Esperanto la plej bona solvo.

Tamen atentu! Uzi radikojn el la ĝenerala lingvo por formi novajn vortojn, ekzemple terminojn, ankaŭ havas siajn danĝerojn. Unu efiko de tiu modelo de vortfarado tre ofte estas aŭ specialigo aŭ pli larĝigo (ĉiukaze ŝanĝo) de la signifo de la uzataj radikoj. Rezulte la signifo de kunmetita vorto ne plu estas (ekzakte) la sumo de la signifoj de ĝiaj elementoj. Per ofta uzo de la skemo la lingvo do fariĝas malpli skemisma: oni devas lerni la signifon de la kunmetitaj vortoj samkiel oni tion devas en la kazo de pruntitaj neologismoj.

Ankaŭ ĉi tiu dua vojo ne estas fremda en Esperanto. Kiam ni diras *lernejo*, ni kutime ne celas kiun ajn ejon kie okazas lernado, sed tre specialan tian ejon kaj eble eĉ ne nur la ejon, sed la tutan institucion. Kiam ni diras *kompreneble* ni ne plu celas "en

maniero kiun oni povas kompreni" sed ni celas sufiĉe specifan signifon.

Se ni volus fari terminojn (ekzemple gramatikajn) nur per ne-neologismoj, ni devus preni radikojn, kiuj en la ĝenerala lingvo jam havas certan signifon, kaj uzi ilin ofte por esprimi ion, kio estas kontraŭa al tiu signifo. Imagu la jenan frazon, en kiu mi evitis la vorton *tenso*: "La tempoformo en ĉi tiu ekzemplo tute ne havas tempan signifon" (kial do ĝi nomiĝas tempoformo?) aŭ: "La pasintecoformo ĉi tie esprimas estantecon" (ĉu do ĝi ne nomiĝu estontecoformo?)

Kiel ĉiu lingvo Esperanto devas evolui. Se ĝi ne dekomence estus havinta evolukapablon, ĝi neniam estus fariĝinta lingvo, sed restus projekto. Lingvoevoluo okazas interalie per ampleksigo de la vortprovizo. Sur vortkrea tereno ni do sekvu limigitan naturismon *por savi la skemecon*. La vortfara skemo de Esperanto estas tiel utila, ke ni ne detruu ĝin per trotordado de la plej oftaj radikoj.

Fakte mi ne bezonas pledi por tio, ĉar la lingvokomunumo mem evoluigas la lingvon tiel, ne multe aŭskultante pledantojn. Kaj ĝi, la komunumo de la parolantoj, ja estas la fina juĝanto.

Klaus Schubert (Nederlando)

Vivu la simpla Esperanto

Post atenta tralegado mi metis flanken la novembran numeron de la revuo por skribi al vi leteron pri la *fragmentoj* de Karolo Piĉ. Intertempe alvenis ankaŭ la decembra numero, mi do skribas al vi unu leteron rilate al ambaŭ numeroj.

Kiel ordinara parolanto de la ĉiutaga parola Esperanto, mi demandas min kaj vin kiucele oni havas akademion de homoj, kiuj ŝatas inventi lingvojn kaj ne flegi la fundamentan Esperanton.

Ĉiuj ordinara parolantoj uzas nur la esprimon *komputilo*, kaj jen oni daŭre instigas nin al *komputoro*, *komputro* kaj *komputero* (ĉiuj fremdaj al la ordinara spirito de la lingvo). Ĉiuj parolantoj uzas la esprimon *presilo*, kaj jen oni instigas nin al *printilo* aŭ *printero*.

Pri Karolo Piĉ ĉia racia kritiko estus sub la necesa nivelo. Mi vere ne scias kiel nomi la fenomenon Piĉ en ĝentilaj vortoj.

Mi volas kapti la okazon por subteni la starpunkton de Akiko Ŭusink-Nagata kaj de la japana studento citita de ŝi. Kvankam ankaŭ ili povus iri al la alia ekstremo, mi kredas ke pluraj el la observoj de s-ino Ŭusink-Nagata estas atente pristudendaj.

Konklude, malvivu la eksperimentoj eksterfundamentaj kaj vivu la normala, simpla kaj logika Esperanto parolata de la esperantistoj.

Renato Corsetti (Italio)

AŬKCIO DE ANTOLOGIOJ

UEA vendas aŭkcie jenajn duoblaĵojn el sia biblioteko:

1. **Angla antologio 1000 — 1800**, Rotterdam 1957, bind.
2. **Antologio de brazilaj rakontoj**, 2-a eld., Rio de Janeiro 1954, broŝ.
3. **Ĉeĥoslovaka antologio**, Budapeŝt 1935, broŝ.
4. **Dana antologio**, Haderslev 1961, bind.
5. **Frisaj rakontoj en Esperanto**, Drachten 1964, broŝ.
6. **Hungara antologio**, Budapeŝt 1933, bind.
7. **Kataluna antologio**, 2-a eld., Barcelona 1931, bind.
8. kiel n-ro 7, broŝ.
9. **Sveda antologio**, Unua parto, Stockholm 1934, broŝ.
10. **Svisa antologio**, Budapeŝt 1939, bind.

Ofertoj devas atingi UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, plej malfrue la 30an de aprilo 1987. Sufiĉas mencio de la numero de la aŭkciaĵo. Efektivaj sendokostoj aldoniĝos (minimume 5 guldenoj).

Ilumina kaj rivela planlingva sistematiko

Internationale Plansprachen; Eine Einführung, Detlev Blanke (1941). Berlino: Akademie-Verlag, 1985. 408p. 21cm. ISSN 0138 550 X. Serio Sprache n-ro 34. Kun 86-paĝa bibliografio. Prezo: 48,00 gld.

Ĉi tiu libro estas laŭ mi nun la plej bona superriĝo pri la internaciaj planlingvoj, la lingvoj formitaj per konscia planado por internacia uzado. En la unua parto "Lingvoplanado kaj planlingvoj" Blanke diskutas plurajn terminojn uzatajn en la literaturo kaj decidas por "internacia planlingvo" kiel la plej konvena termino. En ĉi tiu parto li traktas la internaciajn planlingvojn ankaŭ en rilato kun la planado en naciaj lingvoj. Tio helpas meti la internaciajn planlingvojn en pli larĝan socian kaj kulturan kadron, kio estas ilumina tiel por planlingvanoj kiel por eksteruloj.

En la parto 3a "Planlingvoj (projektoj): Klasifikoj kaj ĉefaj reprezentantoj" li aranĝas la planlingvojn ne kronologie, sed sisteme, kio estas multe pli rivela. La planlingvojn li klasigas laŭ du kriterioj, laŭ ilia *socia bazo* kaj laŭ ilia *lingvistika strukturo*.

voj li priskribas tiel la praktikan uzadon kiel la lingvistikan strukturon.

Li mencias ankaŭ kelkajn planlingvotipojn kun nur kulturhistoria signifo, sed la nun plej gravaj tipoj estas la *naturalisma* kaj la *aŭtonoma*. La naturalismaj planlingvoj (ĉefe Occidental-Interlingue kaj Interlingua) strebas al maksimumaj natureco kaj internacieco de vortaro kaj strukturo, praktike ĉefe surbaze de la latinidaj lingvoj; la aŭtonomaj planlingvoj (ĉefe Esperanto kaj Ido) strebas al simpleco kaj reguleco de strukturo. Li analizas la politikajn kaj kulturfilozofiajn bazojn de tiuj du skoloj. La naturalistoj strebas unue al facila komprenebleco por poliglotoj kaj konsideras la eŭropan kulturon kiel esence ligitan al la eksteraj formoj de eŭropaj vortoj; la aŭtonomistoj strebas al facila lernebleco ĝuste por malpli edukitaj homoj kaj laboras (precipe la esperantistoj) serioze pri la evoluigado de propra kulturo, i.a. literaturo, ne atendente teoriant pruvon de la ebleco de kulturo en aŭtonoma planlingvo.

Blanke tamen esploris nesufiĉe, ĉu Esperanto fakte estas pli facile lernebla por nelatinidaj monoglotoj ol Interlingua. Ambaŭ havas partojn, kiuj estas — konsiderate en si mem — pli facile lerneblaj por nekonanto de latinidaj lingvoj. La dana instruisto

Anwendung →	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
Plansprachliches System	Veröffentlichung des Systems	Der Autor gibt eine kleine Zeitschrift i. d. System heraus	Relativ starke Propagierung. Es gibt einige Anhänger (erste int. Korrespondenz)	Gewisse organisatorische Formen der Propagierung (kleine Organisationen)	Belletristik: einige Übersetzungen, etwas Originalliteratur	Einige Zeitschriften in der Plansprache	Gewisse Anwendung für fachliche Zwecke (Wiss. und Technik)	Gewisser Unterricht (Kurse, nichtstaatlich)	Gewisse int. mündliche Verwendung (int. Veranstaltungen)	Stärkere prakt. Verwendung für Fachzeitschriften, Fachorganisationen	Einige weitere nat. u. internationale Organisationen
zählreiche Projekte	→										
Ro (FOSTER, 1908), Medial (WEISBART, 1923)	→										
Idiom Neutral (ROSENBERGER, 1898), Novial (JESPERSEN, 1928), Neo (ALEXANDARI, 1961)	→										
Latino sine flexione (PEANO, 1903), Basic-English (OGDEN, 1930)	→										
Volapük (SCHLEYER, 1879), Ido (BEAUFONT, COUTURAT, 1907)	→										
Occidental-Interlingue (DE WAHL, 1922), Interlingua (GODE, 1951)	→										
Esperanto (ZAMENHOF, 1887)	→										

Tabelo 2 el Internationale Plansprachen: Diversaj gradoj de praktika uzado de planlingvaj projektoj. La Esperanto-sago pluiras tra sep aŭ ok pliaj kategorioj.

Laŭ ilia socia bazo Blanke distingas tri klasojn de planlingvoj: *planlingvoprojektoj*, kun neniu aŭ preskaŭ neniu praktika aplikado; *duonplanlingvoj*, trovintajn certan praktikan aplikadon, sed ne penetrantajn en ĉiujn sferojn de la homa vivo, kaj la *planlingvon*, penetrantan en ĉiujn sferojn de la homa vivo, al kiu lasta rubriko laŭ Blanke apartenas nur Esperanto. Por la planlingvo kaj duonplanling-

Paul Moth transiris de Esperanto al Interlingua rimarkinte la malfacilecon de la Esperanta akuzativo por siaj lernantoj. Ĝenerale Blanke parolas tro skeptike pri la ebleco de objektiva valorjuĝo de planlingvoj laŭ kriterioj de vortara internacieco, facila lernebleco kaj klareco. En la interlingvistika literaturo ekzistas objektivaj kriterioj por la internacieco de la vortaro; la problemoj estas nur, ke ek-

zistas *pluraj* tiaj kriterioj, ĉiu realigita en planlingvo. Ankaŭ la facilan lerneblecon de planlingvo por donita popolo oni povus juĝi per lernaj eksperimentoj.

Sed la decidpesado inter la postuloj de facileco kaj klareco, kaj inter facileco por malsamaj popoloj, kaŭzis senfinajn disputojn en la interlingvistika literaturo. El praktika vidpunkto eble estas racia sinteno akcepti planlingvon, kiu praktike pruvis sian uzeblecon en ĉiuj vivosferoj, anstataŭ ekimplikiĝi en diskutadon pri la ĝusta ekvilibro inter diversaj postuloj je planlingvoj.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

Unika disvolviĝanta eposo pri la Dia Volo

La konflikto de la epokoj; Libro 2, Edwin de Kock (1930). Pretorio: la aŭtoro, 1985. 20p. 21cm. Prezo: 3,00 gld.

La granda eposo de Edwin de Kock, *La konflikto de la epokoj*, kvankam nefinita (aperis du libroj el la planitaj sep), havas jam sian historion. Naŭ ĉapitroj de la unua libro aperis jam en 1961 en *Ombroj de la kvara dimensio*, la deka ĉapitro kaj la lasta de la unua libro aperis ses jarojn poste en *Fajro sur mia lango*. En 1984 la poeto reaperigis la unuan libron, draste reviziitan, precipe metrike. Verkon, unue kvintrokean, li refaris en kvinjamboj en la konvinko, ke "por verko tiel longspira" ne taŭgas la originala kvintrokea ritmo. En la dua libro, aperigita en 1985, li ankaŭ reuzas la apostrofon ĉe elizioj, kiun li estis ellasinta en la eldono de 1984.

En la Antaŭparolo al la dua libro la leganto estas informita pri tio, ke ĝin la poeto elfaris dum ok monatoj, laŭŝajne en 1985. Do, estis interrompo en la verkado de la eposo dum proksimume 25 jaroj. Unu jaron antaŭe la plano antaŭvidis kvin librojn, nun ĝi anoncas sep. La poeto evidente elektis por si sep "gvidantojn" tra la "homepokoj", unu por ĉiu libro; ĉi tion anoncas Moseo, la dua gvidanto, jene:

" — do Li al vi destinis en kompato la sep gvidantojn (Henoĥ la unuan kaj min la duan) tra la historio, ĉiun por homepok' aparta; ĉar per tiu nombro nia mondrakonto ĉapitriĝas...."

Laŭ tio, de Kock ĝis nun pritraktis du "ĉapitrojn" de nia "mondrakonto" per la du unuaj libroj de sia eposo. Pri kio temas tiuj du "ĉapitroj"? La ĉeftemo de la unua libro estas la ribelo de Lucifero kontraŭ Dio, disvolvita surbaze de mitoj kaj sciencfikciaj ideoj. En la dua libro la poeto vojaĝas tra praaj tem-

poj sub gvido de Moseo kaj revivas dramajn scenojn en Egiptio, Hindio, la Bibliaj landoj. Tute neblas per tricentkelke da vortoj krom tuŝeti la esencon de la vizio de la poeto, bazita sur lia religieca mondriĝardo, sed laŭ la jam aperigita materialo mi tamen kuraĝas aserti, ke ĝi estas la Dia Volo kaj la dolora



Moseo (de Miĥelanĝelo): la dua gvidanto.

irado de la Malobeo survoje al fina repaciĝo. Mi antaŭvidas, ke fininte la verkadon de la sep libroj Edwin de Kock atingos ion unikan kaj neripeteblan: verkon en kiun li metis sian tutan menson, por citi lian propran eldiron en la Antaŭparolo.

Baldur Ragnarsson (Islando)

Kun polemika lanco sur literatura bataalkampo

Pri literatura kritiko, Fernando de Diego; kun prologo de Karolo Piĉ. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 70p. Broŝ. Prezo: 21,60 gld.

Al ĉiu, kiu iel okupiĝas pri la Esperanta literaturo, ĉi tiu libreto estos kaj grava kaj foje akre sprona. Se ĝi stimulos polemikon, verŝajne tio jam plenumos unu celon de la aŭtoro.

La kadro estas prelegserio de SEL (Sarlanda Esperanto-Ligo) kiu jam libre fruktis per pli specifaj esploroj fare de Auld, Boulton kaj de Diego mem, por certagrade dementi lian unuan tezon, ke ankoraŭ ne ekzistas literatura kritiko en Esperanto. Li unue difinas la altan kritikon kaj taksas diversajn provojn laŭ tiuj kriterioj. Ŝajne, li nur ne disponis la *Studoj pri la Esperanta literaturo* de Benczik. Tamen, kiel Piĉ atentigas en sia piĉisma prologo, ne te-

mas nur pri teorio de literatura kritiko, de Diego mem kritikas. En la dua prelego li venas al kritiko super la lingvo, kaj prezentas aktualajn turnirojn substandarde de la ĉefaj protagonistoj. Post trifoja legado mia ekzemplero estas mozaïke signita per steloj, demandosignoj, substrekoj, krisignoj kaj krucetoj; ĉar oni jen aplaŭdas ion aparte trafan kiun oni delonge volis mem akcenti, jen detenas la vizaĝon en spasma nekredemo kiam amatan ĉevaleton lia kavalira lanco senindulge trapikas morta.

Survoje li defendas la propran praktikon de apliko de naturalismaj elementoj al la lingvo. Mi tamen vidas, ke li ne akceptas la kontraŭstaron de kelkaj al literaturaj neologismoj, kiu ne rilatas al malakcepto de ia faka vortprovizo sed al evito de literaturisma lingvo disde parolata. Baza problemo tie estas ke ni-aj verkistoj ne ĉiam verkas en Esperanta medio, kaj ne povas tiom ĉerpi el la parolata lingvo, kiom ili devas kontribui al ĝi. Ekzemple, se neniue efektive diras "hungri", la vorto apenaŭ efikas en teksto.

Nia recenzistiko ricevas propran ĉapitron, kaj prave. Li starigas kriteriojn de bona recenzado, kaj distingas inter tiuj kiuj aperas en literaturaj revuoj, ĝenerale aprobitaj, kaj tiuj aliaj. Recenzo tamen ne estas nur kritiko, kaj necesas en neliteraturaj gazetoj prezenti verkon en pli vasta kadro, unue pro re-

lativa manko de librovendejoj kie oni povas kontroli libron, kaj due ĉar la leganto eble deziras orientiĝi per perspektivo pri la originala verko, se temas pri traduko. Tiu diferenco spegulas la naturon de tia revuo, kiu bezonas ankaŭ legeblecon de ĵurnalismo!

Ĉapitro pri la instrumentoj de la lingvo entenas interalie la — ni diru — kontraŭrevolucion tezon, ke la facila akireblo de Esperanto plene ligiĝas al jama posedo de la gramatiko. Ke lernanto regu tion en la "propra nacia lingvo" antaŭkondiĉas sukcesan lernadon de Esperanto. Tio evidente havas gravajn implicojn por instrumentadoj, lernolibroj kaj reklamado. De Diego fine diskutas la rilaton de ideologio kaj Esperanto, kaj voĉas por praktika idealismo aplikata al la lingvo.

Jen ni trairis temaron pli ampleksan ol la titolo proponis. Senteblas, ke eble paradokse la vera ĝenro estas la polemika. La konkludoj kiuj ŝoktaktike frazas tra la paragrafoj tamen trafas homojn eminente fortikajn. La iom drasta pritrakto de kelkaj temoj espereble spronos aliajn rebati, ke ekzemple la nocio de "nocio" estas finfine pli subtila ol li allasas. La malfruon de ĉi tiu recenzo vi komprenu kiel aproban ateston pri verko samtempe serioze konstata kaj kapriole batalema.

N.T.R. Salvesen (Britio)

Vigla kreinstiga verko, tamen ne kurso

Liza kaj Paŭlo; Sondramo por stimuli la studadon de Esperanto, Reto Rossetti (1909). Teddington (Britio): Grupo Kvin, 1985 (3a reviziita eldono). 12p. Ilus. de Peter Oliver. 21cm. Aparta kasedo. Prezoj: libreto 2,70 gld.; kasedo 15,00 gld.

Ne mankas al Esperanto kurslibroj diverskvalitaj, divers-skolaj. Ja mankas modernaj legaĵoj en bonstila Esperanto, kiujn ankaŭ komencantoj povas ĝui. Tia legaĵo estas *Liza kaj Paŭlo*; la libreto, kun aŭ sen kasedo, uzeblas en ĉiuspeca kurso por komencantoj. Ankaŭ post-komencantojn la riĉa vortprovizo kaj variaj travivaĵoj de la dramroluloj povas instigi al vigle krea uzo de la lingvo.

La sep-paĝan, sep-lecionan tekston de la dramo akompanas, kvazaŭ bildstrie, lertaj desegnaĵoj, kaj sekvas poemoj, prozo, kantoj, konsiloj al instruantoj, enhavolistoj kaj instrukcioj kiel ekzerci la kursanojn. Ne ĉiujn el la konsiloj mi rekomendus. Ĉiun konsilon de sperta kursgvidanto, kiel estas Reto Rossetti, valoras konsideri, sed ne nepre sekvi: ĉiu kursgvidanto decidu mem, kiujn el la konsiloj akcepti kaj kiujn ne.

La surbendigo, kun sonefektoj, estas altnivele realigita. La gratulinde klara elparolo estas iom malflua, verŝajne pro deziro precize eldiri ĉiun literon helpe al la lernantoj, sed ĉu ĉi tio nepre necesas, kiam oni havas tekston por legi dum aŭskultado? Malpli kontentiga estas la intonacio, kiu plejparte impresas malnature, kaj ne kongruas kun la semantika enhavo de la teksto.

Malgraŭ tio, ke oni skribas pri "lecionoj" kaj "kursanoj" mi ne nomus la verkon "kurso". Kursmaterialo prefere grade progresu, prezentiĝu ĉiam konsekvence kaj enhavu pli da ekzercomaterialo ol troviĝas en ĉi tiu verko. Kiel kurs-akompanan literaturon, tamen, mi rekomendas ĝin al ĉies konsidero.

Audrey Childs-Mee (Nederlando)



Abunde kaj redunde, Josef Rumler (1922). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1986. 32p. 21cm. Eseo pri diversaj stiloj en la Internacia Lingvo. Prezo: 3,00 gld.

Alta idealo, La, Omraam Mikhaël Aïvanhov (1900). Fréjus Cedex (Francio): Eldonejo Prosveta, 1985. 20p. 21cm. ISBN 2 85566 359 8. Instruoj de Universala Blanka Frataro. Prezo: 4,20 gld.

Bonan vojaĝon! Esperanto dla turystów, Hanna & Andrzej Pettyn. Bydgoszcz: Centralny Ośrodek Informacji Turystycznej, 1984. 160p. 14cm. 82-segmenta elementa lernilo, kun riĉaj informoj pri la Movado kaj aparta atento al la bezonoj de turistoj. Prezo: 3,90 gld.

Esperanto, de tweede taal voor iedereen. Den Haag: Esperanto-Centrum Nederland, 1986. 38p. 21cm. Ilus. Informilo. 5,40 gld.

Esperanto 100 jaar. Wat doen we ermee? Een fundamentele beschouwing. G.F. Makkink. Lelystad: Stichting IVIO, 1986. 60p. Ilus. 21cm. ISBN. 90 6121 465 3. Pri la monda lingvo-problemo kaj Esperanto. Prezo: 12,00 gld.

Jezični imperijalizam, red. Nikola Rašić. Zagreb: Savez za esperanto Hrvatske i Medunarodno centas za usluge u kulturi, 1986. 82p. 20cm. 11 referaĵoj de la socilingvistikaj simpozioj en 1980 kaj 1982 en Zagrebo. Prezo: 7,50 gld.

Jezik i međunarodno komuniciranje, red. Senad Čolić. Sarajevo: Savez za esperanto BiH, 1986. 222p. 22cm. Prelegaro kaj diskutintervenoj de la simpozio pri lingvo kaj internacia komunikado en la universitato de Sarajevo en 1984. Escepte vasta kaj valora materialo kun resumoj en Esperanto. Prezo: 40,50 gld.

Kantu al la Eternulo (1969). Trad. Jiří Kořínek k.a. Vlaardingen: VoKo, 1986, (dua eldono, pliampleksigita). 43p. 21cm. Voĉoj kristanaj n-ro 13. Himnaro de kristanaj esperantistoj. Prezo: 6,00 gld.

Kie oni trovas tion en la Korano? Isai Sumber. Vlaardingen: VoKo, 1986. 32p. 21cm. Malgranda konkordanco por interesigantoj pri islamo. Voĉoj kristanaj n-ro 11. Prezo: 4,20 gld.

Language planning at the international level. Report of the third annual conference of the Center for Research and Documentation on World Language Problems. New York, December 14, 1984. Ed. Humphrey Tonkin and Karen Johnson-Weiner. New York: CED, 1985. 152p. Mimeo. 28cm. Prezo: 22,50 gld.

Mini rozmówki esperanckie, Andrzej Pettyn — Alina Wójcik. Warszawa: Wiedza Powszechna, 1986. 95p. 14cm. Praktika laŭsitua leksikono kaj frazaro pola-esperanta por turistoj. Prezo: 4,50 gld.

Montara aglo, La, Izjun Cjan. Trad. el la rusa traduko André Cherpillod. Antwerpen: José Starck, 1986. 24p. 21cm. Ĉina rakonto. Prezo: 4,20 gld.

Nove kompilita lernolibro de Esperanto, Li Shijun, Yin Guoyi kaj Gu Jianhua. Eldonejo Fremdlingva instruado kaj studo, 1986. 398p. 20cm. 32 lecionoj por ĉinlingvanoj. Kun detalaj gramatikaj klarigoj kaj abundaj ekzercoj. Prezo: 9,00 gld.

Unua legolibro (1907), Kabe (K. Bein, 1872-1959). Varsovio: Ritmo, 1985. 160p. 15cm. Represo de la klasika libro kun gradigitaj legaĵoj, frazaro kaj letermodeloj. Prezo: 6,00 gld.

Diversaĵoj

Barbuloj, kantas Country-grupo Barbuloj. Supraphon 1133 9670. Stereofona disko, 45 t/m. Kvar kantoj en plenumo de ĉeĥa esperantista kantrigrupo. Prezo: 22,50 gld.

Esperanto first half, Spectrum 48 computer course, Leslie G. Hartridge. Croydon: Lez Peranto Ltd., 1986. Komputila kurso kun du kasedoj (unu kun kvar instruprogramoj kaj sonkasedo por parollernado) kaj tri akompanaj kasetoj. Prezo: 18,00 gld.

Kasedoj: En novan mondon (I) kaj En novan mondon (II). Ontario: Esperanto Press, 1986. Komplete de du po-90-minutaj kasedoj, kun teatraĵetoj kaj poemoj. Prezo: 30,00 gld.

Kasedo: Esperanto 100-jara! Varsovio: P.Z. Polfrakt, 1986. Sur la unua flanko kuŝas du originalaj propravoĉoj paroladoj de d-ro L.L. Zamenhof, sur la dua kantoj kaj poemoj pri Varsovio. Prezo: 16,50 gld.


Kasedo: Esperanto; Lernolibro de la Internacia Lingvo. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1986. Kasedo kun la esperantlingvaj tekstoj de la "Lernolibro de la Internacia Lingvo laŭ la zagreba metodo", akompana do al ĉiu naci-lingva versio de la metodo. Prezo: 11,10 gld.

Kasedo: La granda kantado, Japanio kantas por paco kaj amikeco. Nagoya: Grupo Orkidoj, 1986. 60-minuta kasedo. 17 japanaj kantoj plus du bambuflute ludataj melodi-
oj. Kun akompana libreto enhavanta la tekstojn kaj muziknotojn. Prezo: 31,50 gld.

Poŝtkartoj: Pejzaĝoj de Ĉinio/Scenic Wonders in China. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. Dek diversaj poŝtkartoj pri vidindaj lokoj de Ĉinio, kun tekstetoj en la angla, ĉina kaj Esperanto. Prezo: 3,00 gld.

Poŝtkartoj: Pejzaĝoj de Pekino/Scenic Wonders in Beijing. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. Dek unu diversaj poŝtkartoj pri vidindaj lokoj de Ĉinio, kun tekstetoj en la angla, ĉina kaj Esperanto. Prezo: 2,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!



72a UNIVERSALA KONGRESO

DE ESPERANTO, Varsovio (Pollando),


25a de julio — 1-a de aŭgusto 1987.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: p/a Pola Esperanto-Asocio,
Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1, Pollando

Alta Protektanto: S-ro Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento (Sejmo) akceptis la honoran postenon de la Alta Protektanto de la 72a Universala Kongreso de Esperanto.

Zamenhof-familianoj gastos en UK: UEA estas en kontakto kun pluraj membroj de la Zamenhofa familio, por inviti ilin al la 72a UK kiel gastojn. Jam respondis pozitive d-ro inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof, nepo de L.L. Zamenhof, mem esperantisto kaj dumviva membro de UEA, siatempe membro de LKK de la 44a UK en Varsovio, en la Zamenhofa Jaro 1959.



Turismaj prospektoj pri Pollando: Prepare al la 72a UK, la pola vojaĝagentejo Orbis eldonos entute 6 luksajn turismajn prospektojn pri la diversaj regionoj de la lando. Jam aperis tri prospektoj, kiuj prezentas nordorientan, mezorientan kaj sudokcidentan partojn de Pollando. LKK konsideras distribui la prospektojn al ĉiuj aliĝintoj de la Kongreso, sed se tio montriĝos tro multekosta, la kongresanoj trovos la prospektojn en siaj dokumentujoj.

Filatelaĵoj: Kiel sciante, pluraj ŝtatoj decidis eldoni poŝtmarkojn omaĝe al la Centjara Jubileo de Esperanto. Inter ili estas ankaŭ Pollando, kies poŝtmarko verŝajne estos lanĉita dum la 72a UK mem. Bulgario jam aperigis sian jubilean poŝtmarkon, kaj Kubo faros tion meze de marto. Aperos ankaŭ poŝtmarkoj de Malto, Germana DR kaj Surinamo,

plus eventuale aliaj pri kiuj ni ankoraŭ ne aŭdis. UEA antaŭvidas, ke ĉiuj jubileaj filatelaĵoj estos poste aĉeteblaj ĉe ĝia Libroservo.

23a Internacia Infana Kongreseto: Paralele kun la UK okazos en Varsovio la jam tradicia aranĝo por la infanoj, kiuj estas en la aĝo de 6 ĝis 13 jaroj, kaj kiuj bone regas Esperanton. La Kongreseto havas tute apartan programon, kiu inkluzivas plenan prizorgon kaj kompletan pensionon por la infanoj. Kvankam pluraj detaloj ankoraŭ restas traktendaj, jam estas konata la aliĝkotizo: 120 guldenoj. La gepatroj, kiuj planas aligi siajn infanojn al la Kongreseto, bv. peti specialan aliĝilon de la konstanta kongresa adreso en Roterdamo. La nombro de la partoprenantoj en la 23a Internacia Infana Kongreseto estas limigita al nur 100 infanoj (kvankam Pollando mem havas kelkoble pli grandan nombron da infanoj, kiuj parolas Esperanton).

Kongresa Libroservo: Por ebligi, ke multaj miloj da orienteŭropaj kongresanoj en Varsovio povu akiri kiel eble plej multajn Esperantajn librojn, LKK decidis, ke la kongresan libroservon prizorgu UEA. Siavice UEA planas forte rabati ĉiujn siajn eldonaĵojn por ĉi tiu speciala celo. Ni invitas ankaŭ la aliajn eldonejojn konsideri eblecojn fari same kiel UEA kaj sendi tiurilatajn proponojn al la adreso en Roterdamo. Kelkaj eldonejoj, ekz. Internacia Esperanto-Instituto, jam agis tiel proprainiciate.

Afrikaj esperantistoj en la UK: Post multjaraj plendoj kaj simplaj konstatoj, ke afrikaj esperantistoj mankas en la Kongresoj, LKK kaj UEA nun havas detalajn planojn kiel venigi al Varsovio almenaŭ dekon da afrikaj esperantistoj. La plano estas, ke tiuj afrikanoj pasigu en Eŭropo proksimume du monatojn, kaj utiligu tiun tempon ne nur por sperti la Kongreson sed ankaŭ por spertiĝi (en specialaj kursoj) pri la instruado de la Internacia Lingvo. Se vi povas finance helpi al ĉi tiu unika entrepreno, skribu al la konstanta adreso (aŭ simple sendu vian kontribuadon al la Adopta Kaso, kiu ĉi-jare servos nur por tiu celo). Antaŭdankon.

Statistiko: Ĝis la 20a de februaro la aliĝnombro atingis jam 3800 el 47 landoj. La plej multaj kongresanoj registritaj en la Centra Oficejo venas el Pollando (1091), Francio (164), Japanio (141), Svedio (132), Nederlando (129), Jugoslavio (118), FR Germanio (108), Finnlando (96), Usono (83) kaj Britio (82). Pli grandaj grupoj ol kutime venos ankaŭ el ekz. Brazilo kaj Irano (jam po 28) kaj Malto (12). Ĉe LKK anonciĝis 400 kongresantoj el Hungario, 300 el Bulgario, 250 el Ĉeĥoslovakio, 150 el GDR kaj 70 el Sovet-unio.

● **Jugoslavio:** La Prezidentaro de Jugoslavio honoris Jugoslavian Esperanto-Ligon per la Ordeno pro Merito kun arĝentaj radioj okaze de ties 40-jara datreveno. Kiel motivon oni citis "kontribuon al evoluigo de la amikeco kaj kunlaboro de jugoslaviaj nacioj kun popoloj de aliaj landoj." JEL an-

kaŭ lastatempe fariĝis membro de Jugoslavia Unuiĝo de Socialisma Junularo, la plej alta federa asocio de soci-aj organizaĵoj.

● **Litovio:** En la ĉi-jara eldono de vaste uzata almanako en la litova lingvo (*Kaimo metai*: 200 paĝoj, eldonk-anto 150 000) aperis ampleksa arti- kolo pri la centjariĝo de Esperanto, verkita de Povilas Jegorovas.



● **Kolombio:** La foto montras anojn de Pereira Esperanto-Klubo, kiu fondiĝis pasintjare kun la celoj disvastigi informojn pri Esperanto en sia lando kaj instigi ĝian instruadon. Ili petas informmaterialojn de alilandaj esperantistoj: kontaktu ilin ĉe Calle 20 n-ro 12-43, Oficina 202, Pereira, Kolombio.

Nekrologoj

NELSON PEREIRA DE SOUZA (1925-1986), unu el la gvidaj persone- coj de la brazila movado, mortis la 12an de novembro en Rio-de-Ĵaneiro. Elstara preleganto pri Esperanto, kursgvidanto k.s., li ankaŭ tradukis aŭ kompilis plurajn librojn. Dum multaj jaroj li kontribuis al la evoluigo de Esperantista Asocio de Rio-de-Ĵaneiro, Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Esperanto-Asocio de Brasília, Brazila Konsilantaro de Esperanto k.a. Estante prezidanto de tiu lasta, BKE, li estis elektita sam- tempa prezidanto de Brazila Esper- anto-Ligo (fine de 1985) por tiel faci- ligi la kunfandiĝon de la du tutlandaj organizaĵoj. La konkretiĝo de la revo de brazilaj esperantistoj havi unu so- lan nacian asocion tiel ŝuldiĝas grand- parte al liaj laboroj.

SABINE MÖCKEL (1906-1986), vic- delegito en Wiesbaden, FR Germanio, forpasis fine de la pasinta jaro.

MARIE-THÉRÈSE MICARD, kiu kun sia forpasinta edzo fondis la Kul- turdomon de la Franclandaj Esperan- tistoj (Kastelon Grésillon) en 1952, mortis la 28an de decembro en Caen, Francio.

FRANZ MORAWETZ (1900-1986), sekretario de Budhana Ligo Esperan- tista, mortis la 31an de decembro en FR Germanio.

SAINT JULES ZEE, unu el la plej konataj ĉinaj Esperanto-verkistoj/ tradukistoj, forpasis la 11-an de okto- bro 1986 en Ŝanhajo. Ekde la tridekaj jaroj li okupiĝis pri la Esperanta lite- raturo, kunlaborante kun *Literatura Mondo* kaj *El Popola Ĉinio* kaj kon- tribuante al diversaj antologioj (sep li- aj poemoj aperas en *Esperanta anto- logio 1887-1981*). Liaj prozaj tradukoj estas *Fajrolumo en la fronto* (1950) kaj *Sovaĝa Herbaro* (1951); elstaras lia poezia antologio *El ĉina poezio* (1980).

● **Sudafriko:** En Portelizabeto stariĝis unujara Esperanto-kurso en la teknika universitato, sub gvido de J.J. Zeelie, prezidanto de la loka Esperanto-klubo. La kurso estas alire- bla de studentoj el ĉiuj raso, kaj celas prezenti Esperanton kiel pontlingvon inter ekz. la anoj de la 17 lingvogr- poj en Sudafriko. (Kaj la afrikansa kaj la angla havas siajn problemojn.) La portelizabeta klubo gastigos la unuan nacian Esperanto-kongreson en aprilo/majo ĉi-jare.

Fake

● **Librofoiro:** La Zagreba Foiro, unu el la plej malnovaj kaj plej grandaj foiroj de la mondo, ĉi-jare inkludos Esperantan sektion en sia libra fako "Interliber". Internacia Kultura Servo en Zagrebo kunordigas la aranĝon de tiu Esperanta sekcio, kaj komence de la foiro (9-15 majo) organizos interna- cian simpozion pri la temo "La tu- risma libro en Esperanto". Por parto- preni en unu aŭ ambaŭ aranĝoj, kon- taktu IKS ĉe P.f. 499, YU-41000 Za- greb, Jugoslavio, kiel eble plej baldaŭ.

● **Afiŝ-arto:** La bialistoka filio de Po- la Esperanto-Asocio invitas al kon- kurso por populariga afiŝo pri Espe- ranto. Oni sendu laboraĵon, minimu- me kun dimensioj de 30x40cm, signi- tan per pseŭdonomo kaj kategorio (infana/lernanta aŭ plenkreskula), kune kun fermita koverto — signita per la sama pseŭdonomo — kun no- mo, aĝo kaj adreso de la aŭtoro inter- ne, al Vojevodja Filio de PEA, Pf. 67, PL-15-001 Bialistoko, Pollando. Lim- dato 30a de aprilo laŭ poŝtostampo.

● **Ekologio:** Ekologia Societo de Bul- gario organizas ekspozicion sub titolo de Internacia Ekologia Muzeo, kiu enhavos fakon pri korespondado per Esperanto pri problemoj "tuŝantaj la estontan sorton de la homa civilizo". Ili bonvenigas opiniojn, ideojn kaj ekspoziciaĵojn (ankaŭ kadre de la ĝe- nerala temo de ekologiaj problemoj kaj minacoj) pere de prof. d-ro Hristo Marinov, ul. Ami Boue 51, BL-1606 Sofia, Bulgario.

● **Veteranaj esperantistoj:** Dum la 72a Universala Kongreso en Varsovio okazos "Tago de Veteranoj", kiu in-

kluzivos ĉefkunvenon de Veterana Esperantista Klubo. La ĝisnuna estraro ne plu estos elektebla: tial, se novaj gvidantoj ne troviĝos inter la 1600-opa membraro, VEK redonos siajn taskojn al UEA. (Tiu ĉi notico plenumas kondiĉon de la Statuto de VEK pri antaŭpublikigo de tiu intenco.)



● **Filatelo:** Ĝus aperis la unua jubilea poŝtmarko, el Bulgario (bildo). Esperanto-Societo de Malto lastatempe informis, ke aperos la unua malta

Esperanto-poŝtmarko la 10an de junio. (Vd. ankaŭ Kongresan Komunikon.)

Persone

● **Neergaard:** La 19an de februaro prof. d-ro Paul Neergaard, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis 80-jara. Inter alie konata sciencisto, specialiĝinta pri sempo-logio, li dum pli ol 60-jara aktivado pri Esperanto faris elstarajn paŝojn por plialtigi la nivelon de scienca uzo de la lingvo. Lastatempa iniciato lia estis la fondo de Internacia Scienca Akademio Comenius (vd. *Esperanto* 1986/p. 82-83).

● **Sekelj:** Vojaĝanto eksterordinara, multvoluma verkisto kaj senlaca pro-

pagandanto de Esperanto Tibor Sekelj, fariĝis la 14an de februaro 75-jara. El liaj multaj iniciatoj kaj atingoj kadre de la Esperanto-movado, elstaras lia ĉefa rolo en akceptigo de la Unesko-rezolucio pri Esperanto en novembro 1985. En la pekina UK li elektiĝis Honora Membro de UEA

● **Umeda:** Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, reprezentis la Asocion ĉe la aŭstralia inaŭguro de la Jubilea Jaro, la 9an de januaro (vd. "Loke" en la januara numero). En sia parolado, "La kontribuo de Esperanto al la mondo en 100 jaroj", li emfazis la porpacan strebadon de esperantistoj. En entute unu monato li vizitis la urbojn Perto, Melburno, Sidnejo, Kanbero kaj Brisbano, parolis ĉe la lokaj esperantistaj kluboj kaj intervjuiĝis ĉe diversaj amaskomunikiloj.

Anoncoj

Filologoj kaj amatoroj pri nia lingvo estas hejme en IUEF (*Jarlibro* 1986, p.61). Ne maltrafu la jubilean jaron, kunaktivu per "Filologo": petu pruvnumeron aŭ kotizu 7,00 gld. per R. Moerbeek, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando, poŝtgir-konto 1156545 aŭ rekte al iuef-y ĉe UEA.

Kun celo organizi esperantistan abstinenculan societon ni serĉas esperantistojn, aktivajn batalantojn kontraŭ alkohol- kaj nikotinizado. Ni serĉas seriozajn kontaktojn kun abstinenculaj organizaĵoj de via lando pere de esperantistoj. Skribu al: Eugeno S. Perevertajlo, SU-700 000 Pochtamt, ab/k 140, Taŝkento, Uzbekio, Sovetunio.

Savanto estas movado por paco. Aniĝo estas senpaga, sed respondon pagu. Nedeljko Gavriĉ, Biŝkupiĉi, 71300 Visoko, Jugoslavio.

Helpon por Esperanta agado en Haitio, ĉu fincan, ĉu materialan, ĉu moralan, petas Emmanuel F. Gouthier, P.O. Box 746, Port-au-Prince. La foto montras parton de la grupo de lernantoj en la haitia ĉefurbo: meze sidas s-ro Gouthier kaj Eugene Mustea, sveda instiginto de la grupo kiu foriris fine de januaro.

Kun handikapuloj tutmonde deziras korespondi 22-jara f-ino Zhao Hua, n.100 Anhui Daxue, Heifei, Anhui, Ĉinio.

Esperanto-grupo de Keitele intencas aranĝi ekspozicion kaj pro ĝi ni petas esperantajjn el la tuta mondo, precipe pri infanoj kaj de gejunuloj: leteroj, poŝtkartoj, fotoj ktp, eĉ pupoj. S-ro Veikko Tabell, 72600 Keitele, PL 10 Finnlando.

Por financi la agadon de la junulara klubo en Ngiri-Ngiri, Zairio, ĝia prezidanto, Yaba-Luntadila, B.P. 1972, Kinshasa 1, Zairio, proponas vendi kvanton de zairiaj poŝtmarkoj uzitaj kaj novaj al transmaraj filatelistoj.

Turismajn servojn por esperantistoj komencis Ŝenjanga Esperanto-Asocio. Dum restado en Ĉinio la turistoj Esperantaj ne nur ĝuos belajn pejzaĝojn kaj historiajn restaĵojn kaj konos la vivon de la ĉina popolo, sed ankaŭ partoprenos en la lokaj Esperantaj aktivadoj. Bv. skribi al ili ĉe: 3. section 1. Chongshen, West Road, Hŭanggu-distrikto, Shenyang, Ĉinio.

"Sporto de handikapuloj" — verko de d-ro V. Srdečný, 35 tajpfolioj, serĉas eldonejon kaj fincan subtenon. Skribu al Josef Petera, Pod Vrchy 44, CS-503 52 Skřivany, Ĉeĥoslovakio.

Por Esperanta ekspozicio kaj kolekto, mi kaj miaj gefiloj deziras tutmondajn bildkartojn. Oni interŝanĝos. Dankon! Fantin Kleno, I. Nieveo 13, 33083 Chions, Pordenone, Italio.

Volas kvante vendi bildkartojn el Tanzanio (i.a. pri naturaj rezervejoj) cele al financado de sia studo: Charles K. Hiza, Butumba Teachers Training College, P.O. Box 1411, Mwanza, Tanzanio.

Zhejiang-provinca Esperanto-Asocio, fondita la 14an de decembro, esperas kontakti kun esperantistoj en kulturo kaj amikeco. Skribu al: s-ro Qiu Xi Rong, no. 62 Zhong Shan Zhong Lu, Hangzhou, Zhejiang, Ĉinio.

"Survoje al pontokulturo": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: Homaranismo hodiaŭ, Marburga Manifesto, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (Unuiĝintaj Nacioj), Deklaracio pri Homaranismo (Zamenhof), Preĝo sub la verda standardo (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

JUBILEA TURNEO DE JOËLLE RABU

Joëlle Rabu, profesia kantistino, aktorino, kaj amanto de la vivo koncertos en Eŭropo ĉi-somere. Ĉu ankaŭ en via urbo aŭ regiono? Ĉu vi invitos ŝin kaj ŝiajn muzikistojn por koncerti antaŭ aŭ post la UK? Loka esperantisto aŭ klubo bezonas "profesi-nivele" organizi la ejon, reklamadon, biletojn ktp...

La grupo konsistas el:

Muzikistoj	Tom Neville Charlie Knowles Douglas Dodd
Sonteknikisto	Phil Posner
Sceneja Direktoro	Dusty Rhodes

kaj la fama kanada kantistino Joëlle Rabu.

Joëlle, kiu nun rolas kiel Marĝ en kanada muzikalo, *La Jubileo de Don Messer*, en Vankuvero, poste turneos koncerte en nordokcidenta Usono ĝis majo de 1987. Ŝia koncerta programo daŭras du horojn kaj estas tute memstara.

Joëlle jam estas engaĝita por koncerta sezono en orienta Kanado por la tuta vintro de 1988.



UNIKA ŜANCO POR ESPERANTO-GRUPOJ

La periodon de junio ĝis septembro 1987 ŝi gardas por Esperanto-koncertoj. Ŝi kaj ŝia grupo pretas fari "jubileajn koncertojn" survoje al la UK aŭ revenante. Koncerto povas esti tute en Esperanto — nur por esperantistoj, aŭ ĝi povas esti multlingva se oni deziras pagi la ĝeneralan publikon por enspezi monon por la loka Esperanta asocio, samtempe informante, pere de la beleco de la Esperantaj kanzonoj, pri la Internacia Lingvo.

Jen bela ŝanco. Loka grupo, klubo aŭ individua esperantisto, kiel loka organizanto:

- 1) **buĝetas** sumon por reklamoj, luo de ejo, biletoj ktp;
- 2) **provizas** senpagajn tranoktadon, manĝojn por la grupo;
- 3) **dividas** kun la grupo la enspezon de la koncerto laŭ interkonsento.

Bonvolu agi. Veselin Damjanov, kiu vere amis la voĉon de Joëlle Rabu, diris al Wally du Temple persone: "Kvankam ŝia voĉo kaj la speco de ŝiaj kantoj tute malsimilas al la miaj, ŝi estos multe pli populara ol mi por la ĝenerala publiko. Ŝiaj kantoj estas leĝeraj, kaj ŝia voĉo belsone potenca."

Mi malkaŝos al vi movadan sekreton. Antaŭ la morto de mia amiko Veselin estis plano, ke Veselin kaj

Joëlle renkontu en Eŭropo, survoje al la Jubilea UK, por Esperanta koncerto de du belaj voĉoj, du malsimilaj ĝenroj kaj stiloj. Mi tre multe bedaŭras, mi efektive tristas, ke tio ne povos okazi.

La starpunkto de Veselin dum lia turneo en Kanado estis: "Mi kantu multlingve kaj la programon trione konsistigu Esperantaj kanzonoj. Per belarto, ni sentrude montru la belecon de Esperanto, jes vere subtile."

Mi konsentas kaj invitas vin realigi por vi, por Veselin, por mi kaj Joëlle la devizon: "per belarto al popolamasa kompreno de la riĉeco kaj taŭgeco de Esperanto." Vi povas labori por disvastigi Esperanton, kaj enspezi monon samtempe.

Se tio plaĉas al vi; se plaĉas al vi labori kun bela virino, 26-jara fraŭlino, kies belega voĉo ravas la nord-amerikan publikon, pri kiu jam aperis entuziasmaj artikoloj en la esperanta gazetaro, se jes, tiam ne hezitu. Skribu al:

**Wally du Temple por,
La Rabu Jubilea Turneo,
765 Braemar Avenue,
Sidney, B.C. V8L 3S1,
Kanado.
Tel.1-604-656-5283**

DUM LA TUTA JARO JE VIA DISPONO

- Ĝiaj sep domoj
- ĝiaj gast-ĉambroj unu-, du- kaj kvarlitaj komplete meblitaj
- ĝiaj feri-loĝejoj du- kaj tri-ĉambraj komplete ekipitaj kaj meblitaj, laŭvole lueblaj
- ĝia nova kaj tre bona restoracio
- ĝiaj diversaj salonoj kaj studejoj

Petu la detalajn informojn.
Kultura Centro Esperantista
Pf. 771
CH-2301 La Chaux-de-Fonds

tel. (el eksterlandoj) +41 39 26 74 07
tel. (el Svislando) 039 26 74 07

Fokuso 64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.
Kvaronjara popularscienca magazino
SENPAĜA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

La monda paco estas ne nur ebla sed neevitebla



Jen la kvintesenco de la Mesaĝo pri Monda Paco, publikigita de la tutmonda bahaa komunumo okaze de la Jaro de Paco (1986). Tiu ĉi alvoko pledas por universala rekono de la unueco de la homaro kaj por ĉesigo de rasismo, naciismo kaj religia fanatikeco. Kreskanta konscio pri la spiriteco de la homo donos novan impeton al la homaro por la solvo de ĝiaj akutaj praktikaj problemoj kaj por la starigo de vera paco.

La tero estas nur unu lando, kaj la homaro estas ĝiaj civitanoj

Bahaa Esperanto-Ligo disponigas al ĉiu petanto senpagan ekzempleron de la Mesaĝo. Turnu vin al

**BEL, Boîte Postale 60,
L-4451 Belvaux, Luksemburgio.**

ESPERO POR SENESPERA MONDO:

Jen tre grava kaj urĝa mesaĝo pri la konfuzita mondo. Skribu por senpaga libreto al: **INTERNACIA BIBLIO-MISIO**, 29 Plantation Road, Poole, BH17 7LN, Britujo.

L'Espéranto dans l'enseignement: d-ro Pol Denoël. 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. Prezo: 100 BF. ISBN 90-71652-03-3*.

Initiation théorique et pratique: d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Gramatika lerno-libro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. Prezo: 250 BF. ISBN 90-71652-02-5*. Kaseto: 150 BF. **Corrige des exercices:** 100 BF. ISBN 90-71652-04-1*.

Kelkaj floroj Esperantaj: A.J. Witteryck. Agrablaj legaĵoj kun multaj ilustraĵoj. 1985 (2a eld.). 24p. 21cm. Represo de ŝerc-libreto. Serio 1, n-ro 1. Prezo: 100 BF. ISBN 90-71652-05-X*.

Officiële situatie van het Esperanto onder-richt in de wereld: Germain Pirlot. El Esperanto en la nederlandan. 1986. 36p. Grafikaĵo. 21cm. Ĝisdatigita eldono (nov. 1985) de *Oficiala situacio de Eo-instruado en la mondo*. ISBN 90-71652-01-7. Prezo: 100 BF*

Lingvaj Respondoj: L.L. Zamenhof. 1987 (aperos verŝajne en marto). Ĉefe en la unuaj tempoj, la iniciatinto de Esperanto estis superŝutita de lingvaj demandoj; al ili li respondis en pluraj revuoj. La jenan kolekton redaktis akademiano prof Gaston Waringhien, kaj ĝi enhavas respondojn pri leksikologiaj, gramatikaj kaj jurisprudencaj demandoj. Verŝajne la prezo estos inter 200 kaj 300 BF. ISBN 90-71652606-8.

* Tiuj libroj estis montritaj je Frankfurter Buchmesse 1986.

Eldonejo - librejo

SONORILO

Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj: kun superpresitaj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajo de 50 folioj kaj 50 kovertoj: 145 BF.

Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto: kun homa figuro kaj verda stelo. 7x17cm. Prezo: 25 BF.

Gluafiŝo: Mi (koro) ESPERANTO-N 1887-1987: Formato 6x35cm. Verda preso je diafana papera gluafiŝo; la koro estas ruĝkolora. Prezo: 70 BF.

Gluetikedoj: Esperanto 1887-1987: Orkoloro presita. Uzeblaj sur korespondaĵoj, ktp. Prezo de koverto kun 100 gluetikadoj: 100 BF.

Globkraĵono: Esperanto 1887-1987: Orkoloro presita. Havebla en diversaj koloroj

(de eksteraĵo): blua/flava/ruĝa/blanka/verda kaj nigra. Prezo: 30 BF.

Sunŝirmilo: Esperanto 1887-1987: Blanka preso sur verda fono. 10x139cm (por aŭto). Prezo: 150 BF.

Ŝlosilringo: Esperanto 1887-1987: Orkoloro presita. Havebla en diversaj koloroj: blua/flava/ruĝa/blanka kaj verda. Prezo: 40 BF.

Mendu ĉe: Libroservo de UEA, Libroservo de FLE, Libroservo de UFE, ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe la eldonejo: **Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, 3-2610 Wilrijk, Belgio**. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj. Eldonejo & Librejo Sonorilo estas oficiale registrita (rekonita) asocio, kaj estas membro de VBVB kaj de VUNB.

Esperantistoj kiuj loĝas en Belgio povas mendi siajn Esperantajn librojn ĉe oficialaj ne Esperantaj librovendejoj: ĉe filioj de Boekhandel De Standaard kaj de Het Volk, kaj ĉe: Deca Bookshop (Aarschot); Antwerpse Lloyd; Belis Vinck; De Nederlandse Boekhandel; Uilenspiegel kaj Veritas (Antwerpen), Altiora (Averbode), Brugse Boekhandel; Kinds; Memling (Brugge); A la Page; Van Belle; Europese Boekhandel; Simon Stevin (Bruselo); Alverman; Artevelde; Herckenrath; Marsival (Gent); Heideland;

Poespas (Hasselt); Van Geel en Cie; Van Sande (Herentals); Edel (Ingelmunster); Spectator (Izegem); Acco; Peeters; Wouters (Leuven); Hernieuwen-Uitgaven kaj De Nieuwe Gids (Roelare); Wase Boekhandel (St. Niklaas); Delta (Wilrijk); kaj Librairie Goedert (Namur). En Nederlando: Ten Have-Hoofdstad Boekhandel (Amsterdam) kaj Martinus Nijhoff International (Den Haag). Entute Eldonejo & Librejo Sonorilo kunlaboras kun pli ol 400 ne-Esperantaj librovendejoj.